

LA ONDO de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto

Prezidanto Dasgupta
respondas

Ŝtatprezidento ĉe
Esperanto-budo

Novaĵoj el Esperantujo

Eŭropa Unio kaj Hinda
Unio samopinias pri
multlingvismo

Aktualaj problemoj de
zamenhofologio (3)

“Bemolo”: novelo de
Valerij Brjusov

Nia trezoro: *La Revuo*

E@I laboras ne nur
virtuale

Bonvenon al la
Sukcena Lando



2009

4

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO 2009. №4 (174)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Tatjana Auderskaja, Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Viktor Kulakov, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloisio Sartorato, Serge Sire, Maria Sokolova

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefono (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2009

Internacia tarifo: 38 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 20 eŭroj

Ruslanda tarifo: 450 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj por ĉiuj landoj

Perantoj vidu la liston sur la 27a paĝo de la februara kajero.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 650 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (3000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (1000 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (600 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 15 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripetito.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2009.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2009, №4 (174).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 16 марта 2009 г.

Цена свободная. Тираж: 650 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

Redakcie

Ĉiun trian kajeron ĉi-kolumne aperas redakcia komentario pri nia agado. Pasint-foje, en januaro, vi legis ĉi tie, ke ĉiam pli komplika iĝas la trafiko inter Kaliningrado, kie la revuo estas redaktata, kaj Olsztyn, kie ĝi estas presata. Iam inter la du ĝemelurboj okazis 14 regulaj busvojaĝoj ĉiusemajne (po du ĉiutage), poste estis unu vojaĝo ĉiutage, kaj en la fino de 2008 ni havis nur du busvojaĝojn ĉiusemajne. En februaro la buslinio estis “provizore nuligita”, ĉar tro malmultaj kaliningradanoj sukcesas ricevi eŭropajn vizojn por pleniĝi almenaŭ unu buson semajne...

Tio komplikas nian laboron. En februaro nia filo Aleksej faris aventurecan ĉirkaŭvojaĝon, longan kaj koston, por ke vi povu ĝustatempe ricevi la revuon. Vi ja ricevis ĝin, sed ĉu ankaŭ ĉi tiun kajeron? Ni ne scias, ĉar la aferoj de la “granda mondo” estas ekster nia influo. Ni ne povas ŝanĝi la mondon, sed ni devas adapti nin al ĝi.

Kaj en la granda mondo daŭras ekonomia krizo. Kiel antaŭvidite, nia abonantaro ŝrumpas. Je la unua de marto la perdo estis 23 abonoj kompare kun la sama tago antaŭ unu jaro, kaj tiu nombro kreskos. Ankaŭ nia abonhelpa fonduso ĉi-jare estas pli magra ol pasint-jare. Krome, multaj el vi rimarkis, ke la marta (kaj la aprila) *Ondo* havas 24 paĝojn, ne plu 28. En 2008 vi ricevadis ĉiumonate po kvar ekstrajn paĝojn danke al tiucela donaco de nia amiko, sed ĉi-jare li povis donaci nenion pro la drasta malaltiĝo de enspezo... Ankaŭ la prezoj galopas.

En ĉi tiuj cirkonstancoj ni devis akcepti malagrablan decidon pri eldono de plia duobla kajero — maja-junia. Laŭ realisma kalkulo, tio devos sufiĉi. Ni petas vian komprenecon pri tio, ke la sekvan kajeron vi ricevos **nur post du monatoj**, sed la mondo estas tia, kia ĝi estas.

Cetere, en la mondo okazas ne nur malagrablaj eventoj. Ekzemple, hodiaŭ, kiam la tuta kajero jam estis enpaĝigita, ni devis anstataŭigi la pretigitan gazet-rubrikon en la 21a paĝo per lastmomente ricevita informo pri la sukceso de la kampanjo de la partio EDE en Germanio.

Alia evento el la granda mondo spronis nin al eksperimento, kies komencon vi povas jam vidi en nia retejo nun, kiam vi legas ĉi tiujn liniojn. Temas pri interesa sperto de ruslanda verkisto Dmitrij Gluĥovskij, kiu, spite al skeptikemuloj, poĉapitre enretigas siajn librojn antaŭ la apero de la papera eldono. Kaj la papera eldono de lia romano *Metro 2033* pasintjare iĝis la plej vendita libro en Ruslando, ne *malgraŭ*, sed *danke al* la reta eldono. Centmiloj da ruslandaj retlegantoj entuziasmiĝis kaj aĉetis paperan libron. Same okazas nun ĉe la romano *Metro 2034* duono el kiu [jam estas en la reto](#), kaj la unuaj miloj da libroj, aperintaj la 12an de marto en moskvaj librovendejoj, estis tuj aĉetitaj. Ĉu la romano pri terorismo *Serpentoj en la puto* de István Nemere simile furoros en la Bjalistoka libroservo fine de julio post aperigo de la komencaj ĉapitroj en nia retejo? Aŭ denove, malkiel en la “granda mondo”, en nia furorlisto plej altos lerniloj kaj aliaj didaktikaĵoj?

HaGo

AlKo

Sur la kovrilpaĝo estas Svetlogorsk, kiun vidos tiuj, kiuj ekskursos en Kaliningrado somere post la Bjalistoka UK. (*Fotis Olga Ŝipovalenko*)

Prezidmezaj meditoj

Prezidanto de UEA, Probal Dasgupta, respondas al “La Ondo de Esperanto”



Ĉar vi ĵus plenumis duonon de via deĵoro kiel la prezidanto de UEA, verŝajne vi jam scias, ĉu via agado estas tia, kia vi imagis ĝin ĉe via kandidatiĝo, aŭ vi frontis neantaŭviditajn taskojn kaj cirkonstancojn?

La evoluo de la eventoj kaj kolektivaj sentoj ne estis tre malsimila al tio, kion mi imagis ĉe mia kandidatiĝo. Tamen mi devus klarigi, ke mi neniam havas la lukson sufiĉe klarege antaŭvidi, kiel aspekto kuntekstoj por mi novaj, kaj do mi ĉiam revizias mian mensan bildon de la kuntekstoj kaj de la farendoj. Mi eniris la agadon kun la kompreno, ke gvidi signifas esti laŭeble aŭskultema kaj lernema. Devas esti ia kerno de fidinda enhavo en la ideo de Tolstoj esprimita en *Milito kaj paco*, ke estas optimuma gvidanto tiu, kiu plej sekvas kaj lernas — kaj pensis, ke mi sukcesos komuniki al la homoj mian pretecon lerni de kiel eble plej multaj fontoj. La ceteron mi estis volonta lasi al la efektiva fluo.

Kiel kandidato en majo 2007 vi prezentis al niaj legantoj vian movadon programon, kies kerno estis strebo “atingi daŭripovajn agordojn bazitajn sur la realaĵoj de la reta epoko”. Vi skribis: “Mi volas kunkonstrui movadon, kie la tradiciaj membroj, kroĉitaj al eventuale ne tre ĝisdataj ideoj pri Esperanto kaj pri la funkciado, ne sentos sin ekskluzivataj”. Kiel vi realigas ĉi tiun strebon?

En 2007 mi havis bildon pri la ebloj, kiu estis bazita sur la tiutempe reliefa faktoroj. Mia konkreta celo estis lanĉi tripolusan konversacion inter UEA, la realigontoj de la reta modernigo de niaj aranĝoj, kaj la liverontoj de la necesa mono. Iugrade tiu konversacio fariĝis pli celtrafa ol ĝi estis en la antaŭaj jaroj. Tamen, ĉi-momente, ni sidas meze de la nova tasko digesti la mondan ekono-

mian krizon. Pro tio, malrapidiĝis tiu specifa konversacio, ĉar ni evidente devos malpli rapide ensalti en la novajn aranĝojn, ol ni pensis. Tamen, dume, la diskutoj en la retlisto de la Komitato de UEA, kaj en la revuo, pri la eblaj kaj indaj manieroj reagordi nian sistemon de membrecoj jam trafis novan elanon. Tiu evoluo estas ekster la tripolusa konversacio, kiun la asocio malrapide daŭrigas. Mi atribuas la novan elanon al la sukcesaj komunikiĝoj kun la ekstera mondo en aprilo en Ĝenevo kaj en decembro en Parizo; la dinamiko de la movado ne dependas nur de specifaj iniciatoj kaj tiufadenaj rimedoj, sed ankaŭ de la plivigliĝo, kiun ni ĉiuj spertas post unuopaj sukcesoj.

... kaj kun kiuj vi kunkonstruas la movadon?

Mi havas la sperton esti ĉefe kunaganta kun la estraranoj, komitatoj, komisiitoj kaj stabanoj de UEA. Sed sendepende de tio mi restas en rekta kontakto kun la gazetaro kaj kun la publiko. Tiun kontakton foje peras unuopaj reliefigantoj de tiu aŭ alia sektoro de la publika opinio, kiuj plugas specifajn retajn konversaciojn kun mi. Sed ŝajnas esti ĝenerale konate, ke mi estas malfermita al konversacioj kun la ĝenerala publiko. Pro tio mi ofte ricevas retmesaĝojn de konkretaj plendantoj, reagantoj, sugestantoj, kiuj parolas nur por si mem, kaj ne por aliaj; ankaŭ kun ili mi daŭrigas konversaciojn, kiujn mi recenzus kiel sukcesajn. Mi trovis tre helpa la rolon de la gazetaro.

Kio pri alia celo, evoluigado de uzebla prezento de la “pontada” enhavo de Esperanto, kiu, laŭ vi “pontas inter landoj kaj landoj, inter koroj kaj koroj, inter komprenoj kaj komprenoj, eĉ inter pontoj kaj pontoj”.

Tio estis unu formulo de la enhava kerno de mia ideo, ke ni devas prezenti Esperanton ĉefe pozitive, kiel valoron en si mem, kaj malpli ofte negative, kiel alternativon al ekzemple la angla aŭ aliaj interkomunikiloj. Mi ne strebis krei el tiu punta formulo ian sloganon, ĉar ofte la sloganaj ŝablonoj malservas al la movado. Ni estas tre diversaj, kaj mia celo estas, ke la tegmenta asocio en siaj iniciatoj donu al la lokaj agantaroj materialon, el kiu ili sukcese faru proprajn elektojn, remiksojn kaj modifojn. Mi dirus, ke nia estraro sukcesis komuniki al la lokaj agantaroj de la movado, ke ni respektas ĝian diversecon de celoj kaj konkretaj strategioj.

Revene al la unua demando: laŭ la statuto de UEA, la prezidanto reprezentas la asocion, subskribas la ĉefajn dokumentojn kaj prezidas la estraron kaj la Universalajn Kongresojn. La dua kaj la tria “devoj” estas klaraj, sed kio pri la reprezentado? Kiel vi reprezentas la plej grandan esperantistan asocion en kaj ekster Esperantujo?

En Esperantujo, mi komprenas la elektojn al la prezidanteco kiel okazon por konsciigi la movadanojn pri tio, ke la parolantoj de emfaze maleŭropaj lingvoj evoluigis proprajn komprenojn de Esperanto kaj de ĝiaj perspektivoj, kaj ke pri tiuj komprenoj kaj perspektivoj ni ĉiuj devas pli serioze dialogi, anstataŭ supozi, ke ni jam havas pretan kaj ĉiesan tagordon, kiun oni simple efektiviĝu. Alidire, mi konscie agas por iniciati aŭ daŭrigi konversaciojn pri la enhavo de la esperantisteco. Sur la ideo nivelo, mi ne trovas grandan diferencon inter la tasko reprezenti UEA kaj la tasko reprezenti la esperantistecan kiel tuton. Ekster Esperantujo, mi vidas kiel mian plej reliefan tujan taskon la konstruadon

de solida profilo kiel serioza lingvisto, kies lingvisteco absolute kerne prezentas la ideon Esperanto kaj detalajn util ecojn por esperanteroj. Por la jaro 2008–09 la Barata Konsilio de Filozofia Esplorado nomumis min la nacia vizit-profesoro pri la filozofio. Tiurole mi nun verkas libron, bazitan sur prelegoj en kvar universitatoj. La prelegoj prezentis kaj la libro prezentos lingvistikan vizion — mi uzas la terminon substancismo kiel nomon de mia lingvistika vojo — bazitan sur la ideo de pontado kaj specife reliefiganta Esperanton. Sur ĉi tiu profilo mi ofte trafas bazi specifan aliron al la ekstera publiko. Sed en iuj medioj kompreneble mi elektas pli ĝeneralajn diskutpremisojn kaj funkcias malpli persone; tie mi reprezentas ĝenerale la lingvanaron kaj specife la Asocion.

Via antaŭulo duonŝerce nomis sin “prezidanto de ĉiuj esperantistoj”. Ĉu vi iusence reprenis la stafeton?

Mi min rigardas kiel kreanton de sinergio inter la tre diversaj agantaroj, kies laboro havas ŝlosilan lokon por Esperanto. Tiun sinergion oni malfacile funkciigos en la praktiko, se niaj konversacioj ne atingos konverĝajn klavojn en la teorio. Mi agnoskas la specifan valoron de la praktikaj intertraktoj, sed mi trovas, ke serĉi samtempe komunajn komprenajn klavojn estas helpe ankaŭ al la praktiko de la intertraktado. Mi

provas prezidi dialogon inter diversaj esperantistecoj. Tio ofte signifas, ke meze de specifaj intertraktadoj mi ne povas akcepti la respondecon sincere reprezenti interesojn, kiuj sin difinas kontraŭale al la pli ĝeneralaj interesoj. Tiam mi foje lanĉas seriozan dialogon kun tiuj gravaj malplimulto — kaj tiamaniere esprimas pretecon labori por estonteco, en kiu prezidanto de UEA povos ankaŭ ilin sincere reprezenti.

Ĉu vi havas kontaktojn kun SAT? Kun la Esperanta Civito?

Formale, mi havis ĝis nun kontaktojn kun neniu alia mondskala Esperanto-organizaĵo. Neformale, mi havas kontaktojn jam de jaroj kun membroj kaj de SAT kaj de la Esperanta Civito. En la nuna momento, aparte reliefe kreskis kontaktoj kun pluraj membroj de SAT, kaj tiu dialogo floras, parte pro sia noveco.

Kiun efektivan rolon en la nuntempa UEA havas la prezidanto, la estraro, la komitato kaj la Centra Oficejo?

La Oficejo solide daŭrigas sian fidindan laboradon por ke la aranĝoj bone meblu. La estraro kaj la komitato stiras ne nur la funkciigon de la sistemo sed la viziadon por ke ni havu baldaŭ sistemerojn, kiuj kontentigos la diversigantajn postulojn de niaj partneroj. La prezidanto provas interpreti la tuton kohera, prezenti bildon, fliki specifajn truojn, kaj entrepreni fojan fajrobriĝadon laboron.

Kvankam inter la kvar lastaj prezidantoj de UEA estis unu eŭropano, unu aŭstraliano kaj du azianoj (inkluzive de vi), Esperantujo estas tro eŭropa. Sufiĉas kompari la membrostatistikon de UEA kaj la laŭmondopartan distribuon de la monda loĝantaro. Kial, laŭ vi, baratano, Esperanto restas plejparte eŭropa fenomeno? Ĉu kaj kiel UEA povas ŝanĝi la situacion?

La iniciatintoj de la Esperantaj konversacioj estas eŭropanoj. Venadis tra la jardekoj reagoj kaj kontribuoj de aliloke. Se la eŭropaj iniciatintoj de la konversacioj digestos tion, kion ni aliaj kontribuis, kaj kvazaŭ revenos al ni kun respondoj al niaj respondoj, tiam ni havos seriozan progreson en ĉi tiu konversacio inter Eŭropo kaj la cetera mondo. Oni kutimas ĉi-rilate paroli ĉefe pri azianoj kaj afrikanoj. Sed mi havas la impreson, ke ankaŭ la kontribuon de ekzemple usonaj esperantistoj niaj eŭropanoj nesufiĉe kompreneme taksas.

Mi devus diri, ke tion mi mencias aparte pro tio, ke kvar jarojn mi knabis en Useno, kaj ke mi ne rigardas min senmikse kiel baratanon laŭ psika konsisto.

Ĉiu postenulo neeviteble ricevas kritikon. Kiun kritikon vi ricevas?

Mi ricevas kritikon ĉefe pri tio, ke mi nesufiĉe rapide kaj insiste agas por ŝanĝi la agadstilon de la malnova burokratio de nia Asocio, kaj pri la nekomprenebleco de miaj tekstoj.

Sed kio pri la kritikoj, kiujn UEA nun ricevas pro aferoj, komencitaj antaŭ via prezidantiĝo? Ekzemple, temas pri la asertoj, ke la Praga Manifesto devas esti forĵetita aŭ reverkita, kaj ke UEA devus ne kongresi en landoj, kiujn iuj taksas nedemokratiaj?

Ha, vi demandas nun pri kritikoj direktitaj al la Asocio mem. Kaj la kritikoj kontraŭ la Praga Manifesto kaj la kritikoj kontraŭ kongresoj en landoj kun laŭ iuj nedemokratiaj registaroj ŝajnas al mi respuguli delongan neaŭskultemon fare de iuj okcidenteŭropanoj al kritikoj kontraŭ la hegemoniaj bildoj pri la demokratio mem. La demokratio temas pri konversacioj. Multaj okcidenteŭropanoj ne komprenas, ke la sanon de tiuj konversacioj povas garantiĝi nur seriozaj streboj al la universaligo de la bazo de tiuj konversacioj. La opozicio kontraŭ la Praga Manifesto estas laŭ la enhavo opozicio kontraŭ la solidareco kun la malgrandaj lingvokomunumoj. Mi provas laŭ miaj kapabloj klare opozicii al tiu opozicio. Sed vi kaptas min en momento, kiam mi ŝuldas seriozan respondon al longa tiutema retmesaĝo de Gary Mickle*.

Ĉu via “socia laboro” en UEA komplikas vian profesion laboron kaj vian familian vivon?

Iugrade jes, sed tio estis klara, kiam mi akceptis la respondecon.

Se vi revenus tempomaŝine al la printempo 2007 kun la nunaj scioj, ĉu vi tamen kandidatiĝus por la prezidanteco en UEA?

Iuj el la intertraktadoj montriĝis malfacilaj kaj streĉaj, sed tamen la respondo estas jesa.

Intervjuis **Aleksander Korĵenkov**

* La interesa reta konversacio inter Gary Mickle kaj Probal Dasgupta pri la socia aspekto de Esperanto daŭras dum pluraj monatoj en la retlisto *Sennacismo* (malsama ol *SAT-diskuto*). Probal Dasgupta promesis resumi ĝin en unu el la venontaj *Ondo*j.

INTERNACIA ESPERANTO-KONFERENCO
KONDOROS, HUNGARIO, 18-24jul09

HUMURA LITERATURO EN ESPERANTO



Informoj, aliĝoj
Eric LAUBACHER, 1 rue Bougainville,
(FR) 78180 MONTIGNY-Bx, Francio
tel. +33 1 30 96 67 91 rete: kasisto@osiek.org
Pál KOZSUCH, Vasút u. 3,
(HU) 5553 KONDOROS, Hungario
rete: pauljuno@freemail.hu
OSIEK: <http://osiek.org>



Amendoj de Novak malakceptitaj

(*Eŭropa Bulteno*) 17 feb en la Kultura Komisiono de la Eŭropa Parlamento okazis voĉdono pri la tri amendoj de Ljudmila Novak rilate la proponon de prilingva dokumento (*LOdE*, 2009, №3, p. 5). Ljudmila Novak aperigis ĉe sia blogo voĉdonilon por aŭ kontraŭ la amendoj. Dum kvar semajnoj estis pli ol kvin mil voĉoj, kaj 99% subtenis la amendojn. Estis ankaŭ 150 interesaj komentoj.

18 feb la slovena ĵurnalo *Delo* aperigis artikolon, en kiu ĝi diras, ke la amendoj de Novak pri Esperanto estis malakceptitaj. Simile skribis hispana ĵurnalo, eble kelkaj aliaj, sed neniu aperigis la konkretajn rezultojn de la voĉdonado.

Ljudmila Novak mem ne reagis al mia peto priskribi la kunvenon, sed en la kunveno ĉeestis ankaŭ la prezidanto de EEU, Sean Ó Riain, kiu mallonge priskribis la eventon jene:

«Fakte mi miris pri la tuto. Ili ege rapide voĉdonis, nur per levo de manoj. Dum unu horo ili voĉdonis pri ses dokumentoj, kaj ĉiu dokumento havis 30–40 amendojn. Estis tiom rapide, ke oni eĉ ne povis nombri. Nur unu fojon dum la tuta horo ili kalkulis precize — estis io pri la budĝeto, kaj la voĉdonado estis 14 por kaj 14 kontraŭ, do “malakceptita”, ili diris».

La kunveno sekve funkciis strange. La prezidantino de la Komitato tute ne permesis debaton. Okazis nur voĉdonadoj per levado de manoj. Oni do efektive ne scias, ĉu la plimulto de la komitatanoj estis por aŭ kontraŭ la amendoj.

La tuta afero montras, ke efektive ekzistas klaraj direktivoj agi kontraŭ ĉiu serioza klopodo, en kiu Esperanto ricevas iun ŝancon. Ne sciante efektive, ĉu Esperanto reale povus havi subtenon, tiuj kiuj havas potencon (mi supozas iuj fortoj en eŭropaj organoj kiuj batalas por la venko de la angla), instrukciis la prezidantinon tiel agi.

Zlatko Tišljarić

Granda interesiĝo pri IKU

Nekutime granda nombro de kandidatoj proponis prelegon por la 62a sesio de la Internacia Kongresa Universitato kadre de la 94a Universala Kongreso de Esperanto en Bjalistoko.

Ĉi-foje UEA ricevis entute 30 proponojn, dum kutime en la lastaj jaroj la nombro estis ĉ. 20. La rikolto estis riĉa ankaŭ teme. Proponoj alvenis en la kampoj de astronomio, etnologio, ekonomio, edukado, historio, interpretado, komunikado, lingvistiko, literaturo, matematiko, muziko, religio, turismo, esperantologio kaj Zamenhofologio.

La Komisiono pri IKU nun prijuĝas la proponojn por prepari rekomendon al la Estraro de UEA, kiu decidos pri la definitiva programo de IKU en sia kunsido fine de marto. La resumoj de la elektitaj prelegoj aperos en la IKU-paĝo de la UEA-retejo <http://uea.org/dokumentoj/IKU>, kie jam troviĝas prelegtekstoj de pluraj antaŭaj sesioj de IKU.

GK UEA

Neŭŝatelo por Esperanto

La Kantona Konsilio de la provinco Neŭŝatelo (Neuchâtel) en Svislando akceptis pozitivan rezolucion pri Esperanto per 60 voĉoj “por” kaj 41 kontraŭaj voĉoj.

Ĝin lanĉis deputito Alain Bringolf, (sur la apuda foto) kiu ricevis apogon per subskribo de 27 deputitoj, kiam ĝi estis oficiale transdonita al la registaro de Neŭŝatelo.

Alain Bringolf kaj Claude Gacond estis kolegoj en la kantona parlamento dum pluraj jaroj kaj kolegoj en la lernejoj de la urbo La Chaux-de-Fonds, kie ili dediĉis sian tutan vivon al instruado al infanoj. Tiel Bringolf povis konsciigi pri la valoro de la aktivecoj de sia kolego Gacond, kiu estas arkivisto de la Centro pri Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI) en la urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds. Kiel emerito li plu laboradas en tiu centro, instruas kaj prelegas sub la aŭspicioj de Svisa Esperanto-Societo kaj Svisa sekcio de ILEI.

Pli frue, en la jaro 2008 du deputitoj el Neŭŝatelo — Francine John kaj Gisèle Ory — proponis UEA-n por la Nobel-premio por Paco.

Mireille Grosjean



Jerusalemo: Amri Wandel kaj Ŝimon Peres

Ŝtatprezidento ĉe Esperanto-budo

15–20 feb okazis en la kongrescentro *Binjane Hauma* la 24a ĉiudujara Internacia Libro-Foiro de Jerusalemo. Same kiel antaŭ du jaroj, Esperanto-Ligo en Israelo funkciigis tie dum la tuta semajno Esperanto-budon, ĉe kiu deĵoris pli ol dek aktivuloj de ELI.

Reprezentantoj de ELI estis invititaj al la malferma ceremonio, kie salutis la ŝtat-prezidento Ŝimon Peres kaj la urbestro de Jerusalemo Nir Barkat. La fama Japana verkisto Hiroki Murakami ricevis la literaturan premion de Jerusalemo, kaj faris imponan paroladon.

Resumo pri ELI aperis en la oficiala katalogo de la Foiro. Centoj da vizitantoj haltis ĉe la budo kaj interesiĝis pri Esperanto, kaj dekoj lasis kontakthinformon. Multaj petis aliĝi al Esperantokursoj (ni afiŝis la okazontan kurson en Jerusalemo kaj la daŭran kurson en Tel-Avivo) aŭ diris, ke ili lernas per *Lernu*. Kelkaj rakontis ke ili lernis Esperanton eksterlande, sed ne havis kontakton kun esperantistoj post kiam ili alvenis al Israelo. Pluraj el ili diris ke ili volas ekviziti la Esperanto-klubojn en Tel-Avivo kaj Jerusalemo. Vendiĝis lernolibroj, vortaroj, kompaktdiskoj kaj aliaj varoj por centoj da sikloj.

19 feb okazis publika prelego de Amri Wandel *Esperanto kaj Zamenhof: kial internacia lingvo?* anoncita en la oficiala programo de la Foiro.

Inter la famaj vizitantoj de nia budo estis prezidento Ŝimon Peres (alta protektanto de la UK en 2000), eksministroj Josi Sarid, Josi Bejlin, kaj Moŝe Arens, kaj la famaj verkistoj David Grosman kaj Meir Ŝalev. Ili ricevis la kompaktdiskon *Bonvenu Paco*.

Amri Wandel



Nova volontulo en Bjalistoko

La lastan februaran tagon alvenis al Bjalistoko el Francio Christophe Chazarein, kiu dum la tuta jaro helpados disvasti Esperanton.

Li eklaboris ordigante librojn por la venonta Zamenhof-Centro kaj helpante gvidi la Esperanto-kurson en la 51a bazlernejo *Ludoviko Zamenhof*. Estas planitaj liaj franclingvaj prelegoj en Alliance Francaise kaj en franca fakultato de la Universitato en Bjalistoko. Ĉiam aperas novaj taskoj. Granda helpo estas lia korektado de tekstoj kaj verkado, danke al kio malaperas “poleca” lingvaĵo de polaj aŭtoroj kaj nacieca vido al la lingvo. Baldaŭ li komencos helpadi ankaŭ pri aferoj rilataj al la 94a Universala Kongreso: preparoj de ekskursaj itineroj, kongresejo, informtabuloj ktp.

Pri lia sinteno rilate al Bjalistoko kaj Esperanto oni povis legi intervjuon en bjalistoka *Gazeta Wyborcza* (5 mar) kaj spekti en Bjalistoka Esperanto-Televido.

Eŭropa Volontula Servo (EVS) estas ebleco por ĉiu junulo, ĉefe eŭropano, travivi senpage interesan aventuron en alia lando. Por volontulo ĝi estas tute senpaga: kovritaj estas ĉiuj kostoj de la programo, transporto, loĝado ktp; krome oni ricevas poŝmonon, havas certigitan asekuron, helpon kaj lingvan kurson. Antaŭe kiel volontulo mi laboris en Tuluzo kun similaj taskoj kiel Christophe; nun mi eklaboris kiel lia helpanto-pri-zorganto, kian havas ĉiu volontulo.

Pro EVS profitis jam multe du urboj, du volontuloj kaj ĝenerale la afero de Esperanto. Mi kredas ke aliaj Esperanto-asocioj interesiĝos pri la programo, kiu ja nenion postulas de tielaj invitantoj de volontulo: nur plenumi kelkajn kondiĉojn kaj havi iom da bonvolo.

Przemysław Wierzbowski

Por ke Eŭropo kompreniĝu

De 27 feb ĝis 1 mar 2009 okazis en Strasburgo la 1a Internacia Konferenco de la politika movado “Eŭropo — Demokratio — Esperanto”.

Kun nur 16 partoprenantoj la konferenco estis pli malgranda ol atendite, sed ĝi estis agrable internacia, ĉar la dek partoprenantoj el Germanio naskiĝis en ses diversaj landoj (Bulgario, Ĉinio, Germanio, Pollando, Ukrainio, Jugoslavio), dum la ses francoj vivis en tri diversaj landoj (Belgio, Francio, Hungario).

Al la programo de la konferenco apartenis diskutoj pri la programo de EDE. Pro malsameco de la opinioj kaj ankaŭ de la politikaj kulturoj en Eŭropo, la partoprenantoj ne sukcesis interkonsenti pri iu difinita programo. Mi persone estas por la akcepto de la Traktaĵo de Lisbono, sed apenaŭ trovis apogon de francaj EDE-anoj.

Same la propono el Francio, ke EU bezonas konstitucion, kiun proponu speciala asembleo elektita nur tiucele kaj kiun la eŭropaj popoloj akceptu per referendumoj, ne trovis multe da apogo de germanaj EDE-anoj: ja multaj bonaj ideoj kiel la eŭro aŭ la plilarĝigo de EU al oriento eble ne estus realiĝintaj, se la popoloj devus akcepti ilin per referendumoj.

La ĝenerala tendenco estis fine, ke EDE ne tro klopodu alpreni oficialajn opiniojn pri aliaj temoj ol lingva politiko. Fakte multaj germanaj subtenantoj de EDE simple ŝatas nian sloganon *EDE — por ke Eŭropo kompreniĝu* kaj ne tro emas diskuti pri politikaj aferoj.

Informstando de EDE en Kehl



Sed ĉiukaze la atmosfero en Strasburgo estis tre amika. Ni klopodis ankaŭ komune prepari la partoprenon de EDE-Francio kaj EDE-Germanio en la Eŭropaj Balotoj de 2009, kaj tio brile sukcesis. Ĉefe francaj EDE-anoj preparis informstandon en la germana urbo Kehl apud Strasburgo — kaj ni ĉiuj kolektis tie dum ĉ. 5 horoj entute 50 subtenajn subskribojn por la partopreno de EDE-Germanio en la eŭropaj balotoj. Mi antaŭe timis, ke surstrate eble dum unu tago nur 2 aŭ 3 homoj subskribus favore al EDE, sed la favora sinteno de la homoj en Kehl kuraĝigis min ankaŭ organizi tiajn standojn en mia urbo Wiesbaden.

Intertempe estas preskaŭ certe, ke EDE sukcesos denove partopreni la Eŭropajn Balotojn, kaj tre verŝajne tio sukcesos nun unufoje ankaŭ en Germanio. Ĉe la stando en Kehl ni, sufiĉe memfide, skribis sur tabulo “Ankoraŭ 895 subskriboj kaj Eŭropo kompreniĝos”, dum 10 tagojn poste jam mankis nur 300 subskriboj por atingi la necesan kvanton de 4.000.

Ulrich Matthias

Esperanto en ALTE-laborgrupoj

Trideko da fakuloj reprezentis dek kvar lingvojn en la laborgrupoj de ALTE (Asocio de LingvoTestistoj en Eŭropo), kiuj kunvenis 17–18 feb en Alcalá de Henares, apud Madrido, gaste de Instituto Cervantes. La lingvoj estis: angla, bulgara, ĉeĥa, dana, eŭska, franca, galega, germana, itala, kastilia, kimra, nederlanda, portugala kaj Esperanto. Nian lingvon reprezentis Kultura Centro Esperantista, komisiita de la Esperanta Civito, per sia delegito Giorgio Silfer.

La Esperanto-delegito precipe aktivis en la laborgrupoj pri enmigrintoj: konsekvence, KCE estas invitita al la eŭropa konferenco kunvokita al Berlino, en septembro 2009, pri lingvaj rajtoj kaj migrofluo. Krome Silfer estis elektita al specifa subgrupo.

Alia grava kontribuo de KCE venis okaze de la ĝenerala diskuto pri la inspektora reglamento. La profesia kompetento de Silfer helpis por pli taŭga formulado de kelkaj paragrafoj. Estas rimarkinde, ke nur plenaj ALTE-membroj ĝis nun rajtis diskuti pri tiu preparata reglamento, kaj KCE estas la sola nur “institutional affiliate” kiu partoprenis: plia agnosko pri la statuso de Esperanto en ALTE.

HeKo

Jubilea fervojista skisemajno

Post 49 IFESoj (Internacia Fervojista Esperanto-Skisemajno) la klubo *Amikeco* en Braşovo (Rumanio) okazigis 21–27 feb 2009 la jubilean 50an IFES kiel la 1an Vintran Internacian Fervojistan Esperanto-Semajnon (VIFES). Ĝin partoprenis pli ol 80 rimanoj kaj gastoj el Aŭstrio, Germanio kaj Belgio.

Ĉi-foje mankis skikonkurso, sed okazis la tradicia sledkonkurso en sunbrila kaj vintra tago kun freŝe falinta neĝo. Gajnis la pokalon Gina Cioban (Rumanio) kaj la duan premion Christian Eppler (Aŭstrio). Martin Stuppnig enmanigis al la gajnintino belegan pokalon, kiun ofertis ĉiama subtenanto de nia aranĝo, la urbestro de Arnoldstein, Erich Kessler...

La vesperajn prelegojn prezentis Martin Stuppnig kaj Peter Kuhnel. Ĉiuvespere okazis amuza programo. Kompletigis nian programon unuafoja tutsemajna staĝo de Esperanto. Lerte instruis la lingvon Ĉe-metode al trideko da komencantoj Peter Kuhnel. La lernantoj ekzameniĝis je la fino de la staĝo kaj ricevis atestojn. E-lernolibroj kaj T-ĉemizojn ricevis studentino Rusalca Butuc (la unua premio) kaj juna flegistino Adriana Baciŭ (dua premio).

Pluraj partoprenantoj esprimis la deziron daŭrigi la lernadon de Esperanto, kaj tiucele ĉiumarde okazos vespera renkontiĝo en la sidejo de *Amikeco*. Laura Ťibuleac, studentino en Bukareŝto, intencas traduki en la novlernitan lingvon propagandilojn por turismaj agentejoj de la ĉefurbo kaj de la aliaj distriktoj de Rumanio.

La turisma programo proponis interesajn vidindaĵojn, interalie, la unikan transilvanian fortikigitan preĝejon Prejmer, kiu estas heredaĵo de Unesko. Ni ne forgesis fari komunan foton en la skvaro *Esperanto*, inaŭgurita kadre de la 57-a IFEF kongreso en Braşovo (2005).

Al la esperantista aranĝo unuafoje kontribuis asocioj de la rumana landa sekcio de la internacia fervojista asocio FISAIC. Tiuj asocioj proponis popoldancojn (Craiova), kanzonojn (Galati), skeĉojn (Iasi) k.a. La prezidanto de la rumana sekcio Florin Dobrescu kaj la direktoro de Fervoja Distrikto Braşovo Aurel Dicu multe subtenis nin kaj partoprenis la interkonan vesperon.

Ni dankas al tiuj geamikoj kiuj faciligis al la organizantoj prezentadon de la historio de IFES okaze de tiu 50-a datreveno.

Rodica Todor



VIFESanoj post la sleda konkurso.

KCE pretas plu kreski

28 feb Kultura Centro Esperantista havis sian ordinaran Asembleon en Ĉaŭdefono, sub la prezido de sia doĵeno, s-ino Sonja Brun. Krom pluraj apogantoj de KCE ĉeestis reprezentantoj de LF-koop, Esperanto-Societo Zürich, Svisa Esperanto-Societo.

La Asembleo unuanime renovigis trijaran mandaton al la Komitato, konsistanta el Perla Martinelli (prezidanto), Dieter Rooke (vicprezidanto) kaj Daniel Muhlemann (sekretario). La Komitato rajtos alekti pliajn membrojn: ili estos preskaŭ certe du el la junulara komisiono (Annette Muhlemann kaj Ciril Läng). La Asembleo unuanime renovigis trijaran mandaton ankaŭ al la kaskontrolantoj, David Buhlmann kaj Giorgio Silfer; krome ĝi elektis vickontrolanton Leontina Santos. Ĝi ankaŭ ratifis la nomumon de la esperanto-delegacio ĉe ALTE: konstantaj delegitoj estas Giorgio Silfer kaj Elisabeth Amstad.

La diskuto pri la komitatataj raportoj enfokusiĝis al la forta kresko de la aktiveco dependa de la hotela dimensio de la Esperanto-Domo, kies enspezado pro luigo de apartamentoj kaj lokaloj atingis 80% de la jarkalkulo. La fakto, ke la nmoveblaĵo tra la jaroj iĝis la ĉefa resurso de KCE, pravas la sagacon de la decido aĉeti la domon en 1999. Des pli ke la koncerna ŝuldo (hipoteka deprunto kaj transpreno de pasivoj el Gastejo Edmond Privat) en deko da jaroj mal-kreskis de ĉ. 240 mil al ĉ. 170 mil svisaj frankoj; kontraste al la valoro de la domo, kiu kreskis de ĉ. 450 mil al ĉ. 550 mil svisaj frankoj.

HeKo

Somerkursaro en januaro

11–25 jan 2009 la Internacia Domo en la Universitato de Sidnejo akceptis pli ol kvindek lernantojn de la tradicia Somera Esperanto-Kursaro. Krom aŭstralianoj grupoj venis el Ruslando kaj el Nov-Zelando, ankaŭ individuoj el Nova Kaledonio, Italio, Francio, Germanio, Japanio kaj el Afriko.

Ĉiutage okazis po du naŭdek-minutaj lecionoj, kiujn gvidis Atilio Orellana Rojas el Hago, Monika Arnaud el Francio kaj Sándor Horváth el Aŭstralio. Fine de la kursaro ĉiu kursano ricevis ateston pri la kurso. La ruslanda grupo prezentis du spektaklojn.

En la eksterleciona tempo oni promenis en Sidnejo kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj, vizitis lokajn esperantistojn. Okazis ekskurso al la Bluaj Montoj apud Sidnejo, kovritaj de multaj eŭkaliptoj. Nia restado en la belega Aŭstralio ne povus esti plena sen konatiĝo kun maro, kanguruoj, koaloj kaj aliaj bestoj kaj plantoj, nekutimaj por ruslandanoj.

Aŭstralia esperantisto Igor Couto helpis nin trovi en Sidnejo rusortodoksan katedralon de S-taj Petro kaj Paŭlo, en kiu iam diservis esperantisto Innoĉentij Serišev.

Jekaterina Malyŝeva





Halina Komar ĉe la urbestro de Herzberg

Prezidantino de PEA en Herzberg

Komence de februaro la prezidantino de la Pola Esperanto-Asocio, Halina Komar, venis al la Esperanto-urbo Herzberg por preparoli komunan agadon enkadre de Grundtvig-projekto (en la programo “Dumviva lernado” de la Eŭropa Parlamento kaj de Eŭropa Konsilio).

Ŝi konsultiĝis kun la gvidantoj de Interkultura Centro (ICH), partoprenis urborigardadon kaj vizitis Esperanto-lecionon en loka lernejo.

Halina Komar estis oficiale akceptita de la urbestro Gerhard Walter en la urbodomo, kie ŝi donis intervjuon al la regiona gazetaro. Pri ĉi tiu vizito aperis longa artikolo kun foto en *Harz Kurier*.

ICH

Ĉeĥio: Renkontiĝo en muzeo

Klubo de Esperanto-Amikoj en Svitavy 28 feb organizis tradician renkontiĝon de esperantistoj. Malgraŭ malfavora vetero kunvenis 35 esperantistoj el 16 loĝlokoj de Ĉeĥio.

Unue ili venis en la Esperanto-muzeon, kie multaj havis la lastan ŝancon vidi la inaŭguran ekspozicion. En marto ĝin anstataŭos nova ekspozicio, dediĉita al la 40-jariĝo de ĈEA kaj ekspozicio de Esperanto-junularo okaze de la Internacia Junulara Kongreso de TEJO, okazonta ĉi-somere unuafoje en la Ĉeĥa Respubliko. La trarigardado estis daŭrigata en la Urba Muzeo, kie troviĝas pluraj novaj kaj daŭraj ekspozicioj. La partoprenantojn akceptis en la urbodomo vicurbestrino Marcela Sezemská. Pri la historio de la bela vilao rakontis nova loka klubanino Milena Brzoňová.

Posttagmeza programo sekvis en la domo de la Pedagogia-psikologia konsultejo, kie Kvido Janík el Ŝumperk rakontis kaj projekciis filmon pri vojaĝo tra Turkio, Jordanio kaj Sirio.

Libuše Dvořáková

Daŭras subĉielaj lecionoj

Esperantistoj el Lorena, Guaratinguetá kaj Taubaté partoprenis la 8an de marto plian Subĉielan Lecionon. Ĉi-foje ĝi okazis en la Florbieneto en la urbo Lorena. Tie oni ekspozicias kaj vendas florojn kaj aliajn ornamplantojn en bela regiono, tiel ke la vizito fariĝas agrabla promonado.

Inter la arboj kaj lagetoj ni legis kaj tradukis tekston pri la bieneto mem kaj pri nomoj de floroj. Sekvis amuza kaj vigla konversacio pri tiu temo. Ni krome ĝuis la pejzaĝon, fotis kaj aĉetis plantojn. Ĉi tiu Subĉiela Leciono estas parto de serio komencita pasintjare de la Lorena Esperanto-Klubo. Ni invitas gesamideanojn al nia regiono por viziti vidindajn lokojn kaj samtempe lerni kaj praktiki Esperanton kaj laŭeble propagandi nian movadon.

Paulo Sérgio Viana



Por la 75a fojo en la Paraiba Valo

La 8an de marto okazis en la simpata urbo Jambeiro, en ŝtato San-Paŭlo la 75a (!) Renkonto de Esperantistoj en la Paraiba Valo. Unuafoje ĝi okazis en tiu urbo, kaj tion ni ŝuldas al la klopodado de loka s-ano Sergio Coelho, kiu bonege regalis nin per perfekta organizo.

La evento okazis en urbocentra lernejo, kaj du budoj proponis librojn kaj aliajn objektojn. Granda afiŝo informis al preterpasantoj pri nia ĉeesto. Post salutoj, oni legis protokolon (Milton Serra) kaj aŭskultis du altnivelajn prelegojn: pri “Morala Inteligenteco” (Guilherme Jardim) kaj pri “Japana Enmigrado en Brazilo” (Osmar Alves). La tuta grupo tagmanĝis en bona restoracio, kiu provizis tipe regionan muzikon. Posttagmeze, oni prezentis “Guton da Gramatiko” (Paulo S. Viana), Kvizon pri Esperanta Kulturo (Alexandre Serafim) kaj intervjuon kun geedzoj Conceição Rodrigues kaj José R. Tenório, du gravaj Esperanto-aktivuloj el la ĉefurbo San-Paŭlo.

Paulo Sérgio Viana

Eventoj

Karnavaltempa konferenco de BEL

Kun trideko da kuraĝuloj, kiuj ne facile atingis la urbeton Bandeira do Sul en la ŝtato Minas Gerais (Brazilo), 22–23 feb okazis en bona etoso la BEL-konferencoj 2009.

En taŭga katolika restadejo oni komforte kunsidis, manĝis kaj tranoktis je favora prezo kaj sub la ombro de impona Esperanta standardo en interna korto. La loka organizanto, João Otávio Veiga Rodrigues, preskaŭ sola regalis ĉiujn per zorgoplena dorlotado — dankon!

Post malferma parolado de Sylla Chaves (“Publikaj Rilatoj por Brazilaj Esperantaj Institucioj”), sekvis altnivelaj prelegoj: “La Historio de la Morto” (J.M.Progiant), “Eŭropa Referenc-kadro: nova internacia sistemo por lingvaj ekzamenoj” (P. Nascentes), “Relego de la Fundamenta Gramatiko” (Geraldo Mattos), “Vortaroj, vortkolektado, brazilajoj en Esperanto” (Sylla Chaves kaj Túlio Flores), “Artefarita Inteligenteco — ĉu ankoraŭ eblas?” (Guilherme Jardim) kaj “Esperanta kulturo: ĉu Esperantistoj estas bone informitaj?” (Alexandre Prado).

Ĉiujn prelegojn sekvis diskutoj, kaj la publiko montriĝis vigle interesata kaj intervenema. Ĉiu partoprenanto ricevis kajeron kun la resumoj de ĉiuj prelegoj, kiun pretiĝis la eldonejo *Oportuno*.

Plej laŭdata de ĉiuj estis la amika etoso kaj la ne tro ŝtopita programo, tiel ke estis sufiĉe da tempo kaj favoraj okazoj por koridoraj, manĝoĉambraj kaj eĉ dormoĉambraj interparoloj, babilado, interŝanĝado de spertoj kaj informoj kaj simpla ripozado en Esperantista medio.

Tia estas la intenco de BEL-konferencoj: ne kiel en kongresoj, ili estu pure kleriga, kulturfluga kaj altnivela uzado de nia lingvo por edukiĝo kaj plifortiĝo de nia komunumo. Fine, la partoprenantoj esprimis la esperon, ke similaj renkontoj plu okazu en karnavalaj tagoj.

Paulo Sérgio Viana

Sylla Chaves kaj Túlio Flores prezentas vortarajn problemojn en Bandeira do Sul.



Gaja semajfino en Meksiko

Signifoplena estis la kvara Meksika Esperanto-Semajfino okazinta 28 feb kaj 1 mar en Gvadalaĥaro (Guadalajara) — unu el la plej gravaj kaj grandaj urboj de la lando.

Sabate matene ĉiuj kunlaboris ĉe la organizado: kelkaj kuiris, aliaj ŝveligis balonojn, plenigis pinjatojn* per dolĉaĵoj, metis librojn kaj diversan materialon sur la montrotablon, ktp. Post prezentado de la organizantoj kaj estraranoj de MEF, Martin Schäffer kaj Morayma Martínez prelegis ĝenerale pri Esperanto, ĉefe por neesperantistoj, tamen ankaŭ samideanoj eksciis pri gravajoj en Esperantujo.

La bonega tradicia manĝaĵo “vianadoj en sia suko”, preparita de Sara González kaj Daniel Moreno, lasis al ni bonan impreson pri la loka gastronomio, la Esperantaj ludoj bone amuzis kaj interkonatigis la partoprenantojn. Per demandoj al spertuloj la komencantoj ekzercadis la lingvon. Kelkajn el ili surprizis la kvanto da originalaj kaj tradukitaj verkoj en Esperanto. Plurajn esperantaĵojn akiris la ĉeestantoj kiel donacojn kaj aĉetaĵojn, sed ankaŭ dekojn da dolĉaĵoj, kiujn ĉiu gajnis post la rompo de la du belaj Esperantaj pinjatoj.

Kompreneble, ne mankis informado kaj diskutado pri agadoj, renkontiĝoj kaj planoj, kiujn havas la anoj de Esperanto-grupo de Guadalajara, kie en marto ekfunkcios nova Esperanto-kurso por komencantoj, gvidata de Kati, kiu ankaŭ celas instrui la lingvon en la Ŝtata Universitato de la urbo. Dimanĉe ni kune iris al la urbocentro kaj ekkonis la plej vizitindajn lokojn de la urbo.

Notu, ke 13–17 jun okazos Somera Kurso de Esperanto kaj Trejnseminario por Esperanto-Aktivuloj, kaj tuj post ĝi komenciĝos la Meksika Esperanto-Kongreso en la ĉefurbo de Meksiko. La kongreso daŭros inter la 18a kaj la 21a de junio.

Mallely Martínez

* **Pinjatoj** (Hispane: *Piñata*) estas koloraj figuroj kaj pupetoj kun kava korpo ene, kovrita per facile rompebla materialo (argilo, kartono). En la internaĵo de pinjato estas dolĉaĵoj, fruktoj kaj aliaj surprizaĵoj. Pinjatoj pendas sur ŝnuro, kaj infanoj aŭ plenkreskuloj kun la ŝirmitaj okuloj laŭvice (komencas la plej juna infano) provas disbati pinjatojn per bastono dum daŭro de speciala kanteto.

(Klarigo de Martin Schäffer)



Esperanto I

Esperanto I estas la titolo de la oficiala kurso, kiun de 5 jan ĝis 20 feb 2009 profesoro Hugo Mora Poltronieri gvidis en la filologia fakultato de la Universitato de Kostariko.

La kurso, okazanta en la universitato ĉiujare jam dum dek jaroj, konsistas el 16 trihoraj lecionoj. Kutime la kurso *Esperanto I* estas malfermita al ĉiuj fakultatoj, sed ĉi-foje ĝi estis limigita nur al studentoj pri filologio. Por la dek du estontaj kostarikaj filologoj, kiuj aliĝis al la kurso kaj finis ĝin, ĝi estas valida kiel poentodona studobjekto.

En la antaŭlasta leciono profesoro Antonio Leoni, el la lingvistika fakultato de la filologia fakultato, prelegis en Esperanto pri la movado kaj pri la aplikado de Esperanto.

Dum la kurso esperantistoj el diversaj landoj solidare sendis salutmesaĝojn en la Internacia Lingvo, danke al kiuj je la fino de la kurso estis organizita ekspozicio.

La kurso *Esperanto I* okazos denove en la venonta jaro.

Antonio Leoni

Sur la foto: Kursfina ekspozicio (*Fotis Hugo Mora Poltronieri*)



Mediterranea Esperanto-Semajno

La tradicia Semajno en Agay apud St Raphaël, bone disvolviĝis en agrabla etoso dum la unua semajno de marto.

Por 60 partoprenantoj funkciis tri Esperanto-kursoj, kiujn gvidis Miguel Gutiérrez (la unua grado), Carlo Bourlot (la dua) kaj Stefan MacGill (la tria).

Ĉi-jare oni multe prelegis pri diversaj landoj kaj regionoj: Krimeo (Gis-le Berger kaj Robert Combes), Viaduc des Fades (Robert Combes), Madagaskaro (Jean-François Coussineau), Centra Ameriko (Philip Chavignon), Kubo (Boris Arrate), Santander (Miguel Gutiérrez) kaj Benino (Monika Arnaud). Okazis promenadoj kaj ekskursoj posttagmeze, dum vespere oni ĝuis lum-bildojn, videojn, skeĉojn kaj dancojn.

Necesas menciigi ankaŭ kursojn de Salsa kaj Merenge, kiujn gvidis dancisto Boris Arrate, kiu devenas de Kubo.

Monique Prezioso

Omaĝo al la prezidanto Sempere

14 feb en Valencio okazis Ĝenerala Kunveno de la urba Esperanto-grupo. Fine de la kunveno oni faris kortuŝan omaĝon al la prezidanto de la asocio, José Pérez Sempere, pro lia grandega, multjara kaj sindona laboro por la asocio. Oni enmanigis al li belan memorŝildon, por kies aĉeto kontribuis la membroj de la asocio.

Sempere estas la animo de la grupo. Konstanta laboranto, ĉeestanto, solvanto de la problemoj, li dum multaj jaroj tenas viva la torĉon de Esperanto en Valencio, kaj la amikecon inter la membroj.

Augusto Casquero

Unufraze

★ La komisiono pri edukado de la brazila Senato pritraktos amendon al la federacia leĝo pri edukado, proponitan de sen. Cristovam Buarqu; pri la amendo raportos sen. Mozarildo Cavalcanti. (Landa Agado)

★ Dana E-Asocio partoprenis en la 8a Forumo de neregistaraj organizoj de baltaj landoj (Elsinore = Helsingor, 26 feb – 1 mar 2009) kadre de la laborgrupo “Longodaŭra instruado”. (*Eŭropa Bulteno*)

★ 7.885 korespondaĵojn ricevis la E-redakcio de Ĉina Radio Internacia dum 2008, pli multe ol en 2007, kiam venis 6.738 mesaĝoj. (*Aŭstria Fervojisto*)

★ 271 solidarecaj mesaĝoj el 69 landoj estis ekspoziciitaj en la Hirosima Centro de Virina Edukado okaze de la Internacia Virina Tago; plej multajn mesaĝojn (62) sendis e-istoj el Francio. (Osioka Tiek)

★ Je 14 mar 2009 al la 94a UK en Bjaliŝtoko aliĝis 1336 personoj el 59 landoj: 228 el Pollando, 204 el Francio, 120 el Japanio, 117 el Germanio, 53 el Nederlando, 51 el Italio, 46 el Belgio, 45 el Ĉeĥio, 39 el Ruslando, 38 el Brazilo. (uea.org)

★ 7 mar en la Kibercentro de La Rochesur-Yon (Francio) dudeko da membroj de la asocio Espéranto-Vendée partoprenis unuafoje en eksperimento, kiu kunligis per Skajpo lernantojn de la kursoj kun E-parolantoj el Japanio, Ĉinio kaj Brazilo. (Henri Masson)

★ 15 feb en ĉeesto de ĉirkaŭ 30 personoj estis inaŭgurita nova propra sidejo de Asocio E-ista de Rio-de-Ĵanejro. (Aloísio Sartorato)

★ Razen Manandhar finis sian plurjaran laboron pri *Nepali-Eo Vortaro*, nun estas serĉata subvencio por eldoni ĝin. (*Esperanto en Azio*)

★ Gliwice-a filio de Pola E-Asocio organizis E-kurson en la Universitato de Tria Aĝo en Kędzierzyn-Koźle; instruas Stanisław Mandrak. (*Pola Esperantisto*)

★ 14 mar 2009 okazis estrarkunsido de Angola E-Asocio, kiu decidis okazigi reelektajn, aliĝi al UEA, eldoni poemaron de Agostinho Neto, konstrui propran sidejon en Luandi sur tereno donacita de Dialundama Michel. (Landa Agado)

★ Ekde 8 mar la E-elsendoj de Radio Vatikana estas aŭskulteblaj podkaste, aldone al la tradiciaj elsendomanieroj. (Carlo Sarandrea)

Venu, venu al Olŝtino fine de juni'

Per ĉi tiuj komencaj vortoj de kanto, verkita de Irena Łowińska, olŝtinaj esperantistoj invitas al la ĉefurbo de Varmio kaj Mazurio por partopreni la Frusome-ran Renkontiĝon de Esperantistoj Ŝatantaj Olŝtinon (FREŜO), kiu okazos de 25 jun ĝis 1 jul 2009.

En la programo, tipe distra kaj turisma, estas Esperanto-kvizoj kaj konkursoj (kun valoraj premioj) de la fama Esperanta kvizulo Marian Zdankowski; ekskursoj al interesaj lokoj en la regiono, pri kiuj vi povis legi en la marta *Ondo*; Esperantaj bivakoj kun kolbasetoj kaj biero; ripozo en la arbarĝardeno; vizitado de la urbo; bankedo en la restoracio *Kolorowa* k.m.a.

Ne mankos prelegoj, kvankam ili ne abundos. La ĉefa preleganto estos la konata redaktoro Roman Dobrzyński, kiu rakontos pri siaj vojaĝoj al Japanio kaj Brazilo. Elżbieta Frenszkowska kaj Wacława Ledzińska prezentos urbajn antikvaĵojn kaj famajn olŝtinajn loĝantojn: Nikolao Koperniko, Feliks Nowowiejski kaj Erich Mendelsohn.

Koperniko estas por ĉiuj bone konata mondfama astronomo, kiu loĝis en la olŝtina kastelo dum 1516–1521.

Feliks Nowowiejski naskiĝis en 1877 en Barzewo apud Olŝtino. Li estis orgenisto en la olŝtina preĝejo de Sankta Jakobo en 1898–1900. Danke al premio, kiun li ricevis en Londono pro sia komponaĵo *Sub standardo de paco*, li studis en gravaj muziklernejoj en Eŭropo kaj iĝis konata muzikisto kaj komponisto.

Erich Mendelsohn, naskita en 1887 en Olsztyn, estas fama arkitekto. Objektojn, kiujn li projektis, oni povas vidi en Germanio, Usono kaj en Pollando.

FREŜO-anoj loĝos en la internulejo de Postlicea Lernejo, kien ne venas la urba bruo, kvankam ĝi situas preskaŭ en la urbocentro.

✉ 10-684 Olsztyn, ul. Orłowicza 35 m. 5 Pollando

✉ efrenszkowska@wp.pl
<http://www.esperantowolsztynie.pl>

La Kastelo en Lidzbark Warmiński



BET-45

La Baltaj Esperanto-Tagoj okazas laŭvice en Litovio, Latvio kaj Estonio. Ĉi-jare la 45a BET okazos 8–12 jul en la Polica Akademio de Paikuse. Paikuse estas antaŭurbo de Pärnu.

La organizantoj konsideris sperton de antaŭaj renkontiĝoj por eviti kutimajn erarojn. Amuzaj vesperoj devos esti por plejparto amuzaj. Sukceso de la somera universitato dependas de interesaj prelegantoj. La ĝenerala temo *Kultura kaj lingva diverseco* estas vasta kaj senfina studobjekto. Interese estus aŭskulti diversajn komprenojn pri tio. Ni volas, ke la ekskursita tago estu pozitive neforgesebla. Amatorarta konkurso postulas aktivan kontribuon de partoprenantoj. Proponoj por la programo estas bonvenaj.

✉ Tõnu Hirsik, Vana-Tartu mnt 5-5, Vaida, Harjumaa, Estonio 75302

✉ esperant@hot.ee

Junia printempo ĉe la Balta Maro

9–17 jun okazos en Mielno (Pollando) la 31a Ĉebalta Esperantista Printempo. Ni kore invitas eksterlandajn kaj polajn gesamideanojn al la pitoreske situanta ripozloko Mielno, por tie ĝui neripeteblan etoson de ĈEP kun multaj interesaj programeroj.

✉ pk 30, 75-016 Koszalin-1, Pollando

✉ barslavo@wp.pl
<http://www.esperanto.koszalin.pl>

Junularo unuafoje en Harbino

La antaŭlastan printempan semajnfiron (23–24 maj) en la ĉina urbo Harbino okazos la 1a Junulara Seminario en Esperanto kun la ĉeftemo “Junularo kaj Interpaciĝo”.

En Heilongjiang-a Scienc-teknika Instituto oni pritraktos la ĉeftemon, aŭskultos interesajn prelegojn, konatiĝos kun la centjara Esperanto-beletro en Ĉinio, diskutos pri la junulara Esperanto-movado en Azio. Estos organizitaj kursoj por komencantoj kaj progresantoj. La sabatan programon kronos junulara arta vespero kun kantado kaj danco de ĉeestantoj.

Dimanĉe oni ekskursos al la pitoreska insulo Suno kaj vizitos la lokon de la 731a bakteriologia trupo de la japana armeo.

✉ songheshu@126.com

EU kaj Hindujo samopinias pri multlingvismo

Dafydd ab Iago el Bruselo

La Eŭropa Unio kaj la Hinda Unio subskribis en marto komunan deklaron pri multlingvismo. “La sperto de Hindujo, sukcese uzanta lingvan diversecon, estas unika en la mondo. Mi kredas, ke EU kaj Hindujo povas lerni unu de la alia”, — diris Leonard Orban, Eŭropa Komisionano pri multlingvismo.

EU kaj Hindujo havas po 23 oficialajn lingvojn kaj multe pli da neoficialaj kaj foje tute subpremitaj lingvoj. La celo de la deklaro, laŭ Orban kaj lia hinda samrangulino Daggubati Purandeshwari, estas plifortigi kunlaboron kaj dialogon pri gravaj temoj, ekzemple, pri lingva diverseco, interkultura dialogo, dumviva lernado, novaj teknologioj por lingva lernado, efiko de lingvoj por dung-eblecoj, komerca konkurenco kaj socia kunteksto.



© Eŭropa aŭd-vida departemento

Kun pli ol unu miliardo da loĝantoj, Hindujo havas tre riĉan lingvan diversecon. Laŭ la lastaj oficialaj statistikoj, tie estas 29 lingvoj parolataj de pli ol unu miliono da denaskaj parolantoj, 122 lingvoj kun almenaŭ 10 mil parolantoj, kaj pliaj 234 lingvoj kun malpli granda parolantaro.

La konstitucio de la Hinda Unio deklaras, ke la hinda estas la oficiala lingvo de la Unio. La angla “povas” esti uzata por oficialaj kialoj, kaj la lando havas 22 oficialajn “regionajn” lingvojn.

“Tia riĉa lingva diverseco estas fakto de la hinduja historio, kaj ĝi estas konsiderata tute natura tiuloke”, — notas la Eŭropa Komisiono. Laŭ la Komisiono, tio tre similas al la lingva kuniĝo en la Eŭropa Unio. Pro tio Hindujo devas esti unuaranga partnero de EU en la sfero de multlingvismo.

Alia similaĵo estas la ĉiam pli granda premo de la angla en ambaŭ Unioj, kaj la daŭra subpremo de “malpli oficialaj” kaj tute “neoficialaj” lingvoj.

“Ni devas sendi klaran mesaĝon, ke ĉiuj niaj lingvoj estas same gravaj, kaj ni devas respekti ĉiujn lingvojn, sendepende de iliaj oficialaj statusoj”, — diris la ministrino Daggubati Purandeswari. “Esence, Hindujo estas multlingva lando, kie lingva diverseco estas parto de nia historia kaj kultura heredaĵo, kaj kerna ero en sia filozofio de nacio-konstruado”, — daŭrigis Purandeswari.

Ŝi vidas la komunan deklaron kun EU kiel ŝancon por edukado.

Ĉu epidemio aŭ endemioj?

Kun amuziĝo mi rimarkis ke Komitatano Z ironie aludis al tio, ke (laŭ li) mi “fariĝis tute lirika en siaj [t.e. miaj] laŭdoj pri la reta kampanjo por subteni proponon al prezidento Obama pri instruado de Esperanto” (LODe, 2009, №3, p. 2). Fakte mi antaŭe reagis skeptike al tiuspecaj alvokoj, sed ĉi-foje mi publike komentis simple, ke mi samopinias al saĝaj homoj kiel mia usona amiko Steven Brewer, je tio ke tiu kampanjo tute ne influos la sintenon de la usona registaro nek la fremdlingvoinstruan (ne)politikon, sed ke tamen ĝi montriĝis interese aktiviga por kaj eble atentiga pri Esperanto.

Min aparte motivigis la fakto ke ĝi okazis en serioza interreta “kampanjejo”, amase vizitata, kiun partoprenas kiel partneroj tre gravaj usonaj kampanjo-asocioj aŭ la usonaj branĉoj de aliaj organizaĵoj, agantaj favore al diversaj mondplibonigaj celaroj: homaj rajtoj (ekzemple, Amnestio Internacia), demokratio (ekzemple, People for the American Way), socia justo kaj evoluiga helpo al malriĉaj popoloj (ekzemple, Oxfam), paco (ekzemple, Americans for Peace Now), mediprotektado (ekzemple, Rainforest Alliance), ktp. Do, temis pri ĝusta loko.

La kampanjo permesis, eĉ se anekdote, iom testi la strategian proponon de Humphrey Tonkin, kiun mi subtenas, nome, ke nia movado, kaj aparte UEA, pli kaj pli sin modernigu laŭ la efika modelo de tiuspecaj kampanjo-asocioj, tamen ne flankenlasante sian necesan rolon provizi valorajn servojn por la membroj. Tial, la procezo mem estis interesa, i.a. ĉar la propono estis prudente (do neblufe) formulita, iuj homoj lerte kaptis la ŝancon informi kaj argumenti pri Esperanto, per la ĉi-kaze konvena lingvo (la angla), kaj la iniciato sukcesis aktivigi multajn homojn.

Mi forte dubas, ĉu surbaze de tiu sperto eblas diagnozi “epidemion” de tiaĵoj, kiel aplombe faras nia komitatano Z. Tamen, laŭ tiu sama lingvaĵo miafaka, mi povus alternative diri, ke nia afero ja estas trafita de kelkaj endemioj, do persistaj malsanoj. Unu el ili estas certagrada aŭtismo de parto el la

movado, kiu ripetante kelkajn limigitajn rutinojn restas enfermita en la propraj cirkloj, kun serioza subevoluinteco de la kapabloj komunikiĝi kaj socie interagi kun la ĉirkaŭa mondo.

Ĉar unu el la simptomoj de tio ĝuste estas la tute nesufiĉaj alproprigi kaj plena utiligo de la Manifesto de Prago flanke de diversaj sekcioj de la movado, diversfoje mi klopodis ligi ĝin al la nunaj scenejoj kaj taskoj: ekzemple, per propono al la Komitato de UEA festi ĝian dekjariĝon per la temo “Prago+10” por la Strategia Forumo (analoge al la Tera Pintkunsido “Rio+10” en Johanesburgo 2002, 10 jarojn post tiu de Rio-de-Ĵaneiro). Fakte okazis aparta kunsido pri la temo dum la UK en Florenco (2006), lige al la Nitobe-procezo, en kiu prelegis H. Tonkin, A. Kadar kaj mi. Simile, dum la Roterddama UK, mi alvokis la fakajn asociojn serĉi kaj trovi la manierojn ligi sian specifan agadon al tiu ĝenerala linio favora al la lingvaj ekologio kaj demokratio, dum la kunsidoj tiel de UMEA kiel de la subkomitato pri scienca kaj faka agado.

Laste, mi diru al komitatano Z ke mi estas konvinkita ke la principoj de la Manifesto de Prago restas daŭre validaj kaj donas ankoraŭan signifon al la pluekzisto de nia tuta afero. Per ĝi Mark Fettes faris unu el siaj multaj gravaj kontribuadoj al nia idearo. Feliĉe, mi certas ke li sindone oferos aliajn espereble el iu gvida pozicio, kunlabore kun tiuj, kiuj plu spertas la mondon kiel esperantoj, socie engaĝiĝintaj, realismaj sed gajaj.

José Antonio Vergara

14 feb en Tuusula (Finnlando) forpasis post longa malsano

Heta Kesälä (1934–2009)

esperantistino ekde sia lerneja aĝo, ŝi ekaktivis movade post la 54a UK en Helsinko (1969), estrarano de la Esperanto-Asocio de Finnlando dum 1973–1995, delegito de UEA ekde 1975, vicprezidanto de LKK de la 80a UK en Tampeero en 1995, ĉefdelegito kaj kotizperanto de UEA de 1990 ĝis 2005. Profesie, ŝi prizorgis bankajn komputilsistemojn.

Kiel peranto de *La Ondo*, Heta atingis tion, ke Finnlando iĝis unu el la landoj kun plej multaj abonantoj de nia revuo.

Ni funebras kaj kondolencas.



Aktualaj problemoj de zamenhofologio

La tria parto de la eseo de Aleksander Korĵenkov

LA IDEOLOGIO

Por ni, esperantistoj, Zamenhof estas la aŭtoro de nia lingvo. Ni forgesas, ke por li mem Esperanto estis nur parto de pli grava ideo: “la revo pri la unuiĝo de la homaro” [MEH, p. 100].

Tiu ĉi ideo estas la esenco kaj celo de mia tuta vivo, la afero Esperanta estas nur parto de tiu ĉi ideo [MEH, p. 100]

Danke al MEH ni havas nun sufiĉe kompletan kolekton de la ideologiaj studoj de Zamenhof kun entute 76 eseoj, artikoloj, paroladoj kaj leteroj kaj, aldone, unu intervjuo. Pli frue dissemataj en PVZ kaj en diverslingvaj gazetoj, nun, kunigitaj en unu volumo, ili ebligas vidi la evoluon de la Zamenhofa socia doktrino.

Por vidi ekzemplon de tiu evoluo, komparu liajn difinojn de la hilelismo/homaranismo en la jaroj 1901, 1906 kaj 1917:

1901. «La hilelismo estas nova religia partio, kiun ni intencas fondi en la sino de la nun ekzistanta hebrea religio, se nia nuna alvoko al hebrea intelektularo trovos sufiĉan resonon en ĝiaj koroj. La hilelismo estas la sama hebrea religio, kiun donis al ni Moseo kaj kiun predikadis profetoj, sed liberigita de tiu flanka almikso, kiu siatempe estis necesa, sed kiu jam delonge fariĝis absoluta anakronismo». [MEH, p. 67]

1906. «La Hilelismo estas instruo, kiu, ne deŝirante la homon de lia natura patrujo, nek de lia lingvo, nek de lia religio, donas al li la eblon eviti ĉian malvercon kaj kontraŭparolojn en siaj nacia-religiaj principoj kaj komunkiaĝi kun homoj de ĉiuj lingvoj kaj religioj sur fundamento neŭtrale-homa,

sur principoj de reciproka frateco, egaleco kaj justeco. La Hilelistoj esperas, ke per konstanta reciproka komunikado sur la bazo de neŭtrala lingvo kaj neŭtralaj religiaj principoj kaj moroj la homoj iam kunfandiĝos en unu neŭtrale-homan popolon». [MEH, p. 130]

1917. «Sub la nomo “Homaranismo” (el la Esperanta vorto “Homarano”, kiu signifas: “Membro de la homa familio”) mi volas paroli pri strebado al “homeco”, al forigo de intergenta malamo kaj maljusteco kaj al tia vivmaniero, kiu iom post iom povus konduki ne teorie, sed praktike al spirita unuiĝo de la homaro». [MEH, p. 235]

Kronologia trarigardo de la Zamenhofaj tekstoj, montras kelkajn ŝtupojn de liaj sociaj ideoj:

1. Establo de juda ŝtato en Usono (1882)
2. Restarigo de juda regno en Palestino (1882)
3. Internacia lingvo, kiu povus, sen entruĝi en la hejman vivon de la popoloj, esti ŝtata lingvo en diverspopolaj landoj (1887)
4. Kritiko de cionismo kaj adopto de hilelismo kiel nova religia partio sine de la hebrea religio (1901)
5. Fondo de neŭtrala popolo kun Esperanto kiel hereda lingvo (1901)
6. Hilelismo / Homaranismo, kiel ponto por ĉiuj popoloj kaj religioj (inter-na ideo de Esperanto, 1906)
7. Neŭtrale-homa religio por divers-eklezianoj kaj ateistoj (1913)
8. Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo kaj Konstanta Tuteŭropa Tribunalo (1914)
9. Homaranismo, kiel strebado al “homeco” kaj spirita unuiĝo de la homaro (1917)

10. Filozofia klarigo de Dio kaj senmorteco (1917)

Klarigi la evoluon de la Zamenhofa ideo kaj komprenigi ĝin estas grava tasko de zamenhofologio.

Zamenhof direktis siajn sociajn ideojn ne tiom al la esperantistoj, kiom al la mondo. Tamen la mondo mem apenaŭ interesiĝos pri ili. Nur ni, esperantistoj kaj zamenhofologoj, povos diskonigi la ideologian heredaĵon de Zamenhof per eldono de tradukoj kun science bazitaj enkondukoj kaj komentoj. Por tio necesas ne nur traduki la tekstojn, sed ankaŭ enkadrigi la ideojn de Zamenhof en lia-tempa socia penso, trovi la fontojn de lia doktrino, montri ties avantaĝojn kaj mankojn. Necesas krome sistemigi la plej gravajn kritikojn de la homaranismo kaj interna ideo.

Zamenhof skribis en sia lasta studo, ke li “multe meditis kaj legis diversajn sciencajn kaj filozofiajn verkojn” [MEH, p. 244], sed ni ne scias, kiuj filozofiaj verkoj staris sur liaj librobretoj, nek pri kiuj temoj li interparolis kun neesperantistaj intelektuloj ktp. Ni do devas mem serĉi la fontojn de la Zamenhofa ideologio.

Laŭ Igorj Simonov²⁹, la ideologio de Zamenhof formiĝis sub influo de la rusa filozofo kaj poeto Vladimir Solovjov (1853–1900), la reformulinto de “tut-unueco” (vsejedinstvo), esprimanta la organikan unuecon de la mondekzistado, interpenetriĝon kaj disecon de ties konstituaj partoj. Kvankam ĉi tiu ideo estas preskaŭ samaĝa kun la filozofio mem, Solovjov en *Pravigo de la bona* donis al ĝi etikan celon de la mondevoluo:

Mi nomas vera aŭ pozitiva tut-unueco tiun, en kiu la unueca tuto ekzistas ne malavantaĝe al ĉiuj kaj ne damaĝe al ili, sed utile al ili. La falsa, negativa unueco subpremas aŭ englutas la elementojn, kiuj konsistigas ĝin, kaj per tio ĝi mem iĝas malpleno. La vera unueco konservas kaj fortigas siajn elementojn...³⁰

Kaj la esenco de la homaranismo de Zamenhof estis ĝuste unueco de la homaro, konsistanta el homaranoj, diversaj lingve, nacie, religie kaj ŝtate.

Solovjov laboris ankaŭ pri la *dihomeco* (bogoĉeloveĉestvo) — dieco de la homo kaj homeco de Dio — kaj li estis inter la unuaj universalemaj kristanoj, traktintaj larĝe la socian mision de kristanismo kaj praktikintaj ekumenismon.

Solovjov, kiu instruis en la Moskva Universitato iom antaŭ la studentigo de Zamenhof, estis alte taksata de la ruslanda juda intelektularo pro la intereso al judismo kaj pro la kontraŭstaro al antisemitismo. En la internacia vivo Solovjov alvokis ami ĉiujn popolojn, kiel sian propran popolon. Liajn tiutemajn verkojn la palestinofila studento Zamenhof verŝajne legis.

Pli rezerveme Simonov mencias la influon de la germania juda filozofo Hermann Cohen (1842–1918), la fondinto de la novkantia Marburga Skolo. Cohen en sia studo *Amo al proksimuloj en Talmudo*³¹ klopodis konformigi la ideon de la elektiteco de la hebreoj kun la mesiisma ideo de la unueco de la homaro, kiu sekvas el la unueco de Dio, kiu kreis la homon laŭ sia bildo. La homo kaj Dio do estas kunkreantoj de la unueca homaro. Sed Mesio venos por starigi la regnon de Dio, nur kiam formiĝos komunumoj da homoj, kunvivantaj pace kaj harmonie, kiel modelo por la tuta homaro. Laŭ Cohen, la juda popolo estas tia komunumo. Cohen do, same kiel Zamenhof, kontraŭis la cionismon, en kies nacia karaktero li vidis perfidon de la mesiisma idealo.

Laŭ Corry van Kleef³², Peter G. Forster³³ kaj Andreas Künzli³⁴, Zamenhof povus esti inspirita de la pozitivisma religio de la franca filozofo Auguste Comte (1798–1857), kreita de li post la morto de lia kunulino Clotilde de Vaux, unue kiel kulto (la altaro estis la fotelo sur kiu ŝi sidis dum siaj vizitoj, kaj la mesoj — trifoje en la tago — konsistis el recitado de latinaj, italaj kaj hispanaj versoj), kaj poste kiel doktrino. La ĉefa en ĉi tiu religio estas ne Dio sed la

homaro, kiel unueca kaj vera Granda Estaĵo, kiun konsistigas ĉiuj vivantoj kaj mortintoj. Comte, kiel la ĉefpastro, reglamentis la eksteraĵojn de la sen-dia religio, interalie, dividinte la jaron je 13 monatoj kaj doninte nomojn ne nur al la monatoj, sed ankaŭ al la semajnoj. Post lia morto, dum la junaĝo de Zamenhof, la pozitivisma religio populariĝis en la Suda Ameriko, precipe en Brazilo, kie ĝiaj anoj en 1888 abolis la sklavecon kaj en 1889 proklamis respublikon. Nun sur la ŝtata standardo de Brazilo estas vortoj de Comte: “ordo kaj progreso”.

La ideoj de Zamenhof estas diversegrade parencaj kun la ideoj de la franca revolucio kaj de la usona “mikspoto”³⁵, kun la rusa kosmismo (ne nur Solovjov), kosmopolitismo, kristana ekumenismo, framasonismo, bahaismo...

Tamen unue necesas esplori la influon de la ĉefaj tendencoj en tiutempa juda socia vivo, kiun Zamenhof partoprenis en sia junaĝo: estingiganta Haskala, asimilismo, aŭtonomismo de Šimon Dubnov (1860–1941), mememancipiĝo de Leon Pinsker (1821–1891), la politika cionismo de Theodor Herzl (Benjamin Ze’ev, 1860–1904), kaj — precipe — la spirita cionismo de Aĥad ĥa-Am (Aŝer Cvi Hinzberg, 1856–1927).

Aĥad ĥa-Am (Unu el la popolo) opiniis, ke por judoj estas necesa ne amasa migrado al Palestino, sed kultura kaj spirita renaskiĝo, kiun povos efektiviĝi negranda elektita grupo da intelektuloj, kiu formiĝis kiel framasoneca ordeno Bnej-Moŝe kun Aĥad ĥa-Am kiel gvidanto. Laŭ li la judo devus koncepti sin samtempe kiel ano de sia nacio kaj de la homaro. Palestino devus esti ne la migrocelo, sed kulturcentro de la juda diasporo, kiu en diversaj urboj havu kulturajn ĉelojn sen politika karaktero. Ĉi tiuj ideoj reaperas ĉe Zamenhof kiel temploj kaj rondoj hilelistaj.

Estas multe da laboro. Fakuloj pri lingvistiko, filozofio, sociologio, religio, historio, tekstologio estas bezonataj por prilaboro kaj prezento de la Zamenhofa ideo al la mondo. Estas bezonataj tradukantoj kaj provlegantoj. Kaj, kompreneble, estas bezonata financado.

Ĉu Esperantujo havas sufiĉe da intelektaj kaj financaj fortoj kaj rimedoj por digne prezenti al la mondo la mesaĝon de Zamenhof ne nur pri la solvo de la lingva problemo, sed ankaŭ pri la paca kunekzistado de popoloj, ŝtatoj kaj religioj, kaj pri la estonta unuiĝo de la homaro?

FINO

Bibliografio

29. СИМОНОВ И. Дело жизни Лейзера-Людвига Заменгофа // Корни, 1997, №7–8. С. 56–73.
30. Соловьев В. Литературная критика. М.: Современник, 1990. С. 62.
31. Cohen H. *Die Nächstenliebe im Talmud*. Marburg: Elwert, 1886.
32. Van Kleef C. *La Homaranismo de D-ro L.L. Zamenhof*: Historia enketo pri la naskiĝo kaj la evoluo de la Zamenhofa Homaranismo / Trad. el la ned. C.Ribot. Marmande: Esperantaj Francaj Eldonoj, 1965.
33. Forster P. *The Esperanto movement*. The Hague, 1982.
34. Künzli A. *De hilelismo al homaranismo ĉe L.L. Zamenhof*. Unua parto // Svisa Esperanto-Societo Informas, 2006, №1. P. 12–22.
35. Źelazny W. *Grava kiel la Fundamento* // La Ondo de Esperanto, 2006. №10. P. 18–19.

En sia ruslingva broŝuro de 1901 pri “Hilelismo”, li montris, kiel kaŭzon kaŝitan de ĉiuj mizeroj de la judoj, la konfuzon, kiu markis, ekde Moseo, la hebrean religion, t.e. la proklamon de unu sola universala Dio, kiu tamen ligis sin ekskluzive kun unu sola homa gento, alidire la kredon, ke la Kreinto de la universo estas samtempe la privata Dio de Abraham, Izaak kaj Jakob, aŭ, pli resume, la starigon de naciisma monoteismo, kiel ajn kontraŭdiraj estas tiuj du vortoj. <...>

Tial li proponis al la elito el la judaro starigi sekton de Hilelistoj, kiuj, iom post iom liberigante sin de siaj kuirejaj, vestaj, kalendaraj ktp apartismoj, povos adori jam sennaciigitan Dion, kaj sekve esti rigardataj de la anoj de la ceteraj monoteistaj religioj kiel veraj fratoj, kiuj ne plu arogas al si privilegiajn rajtojn super la unu Dio. Kaj, por pli akcenti la sennaciecon de sia kredo, li proponis al tiu juda elito uzi por siaj preĝoj, ceremonioj kaj interrilatoj ne la mortintan hebrean lingvon aŭ la judgermanan dialekton, sed la ĵus naskitan Esperanton.

Waringhien G. *Komentario pri la letero al Javal* // Zamenhof L.L. *Letero al Émile Javal (1905-09-24)*. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1973.



Bemolo

El la vivo de unu el ĉi tiuj malgranduloj

Novelo de Valerij Brjusov

Tuj post kiam Anna Nikolajevna finis la edukejon, por ŝi estis trovita posteno de vendistino en la papervendejo “Bemolo”. Malfacilas diri, kial la vendejo nomiĝis tiel; verŝajne, antaŭe en ĝi estis vendataj ankaŭ muziknotoj. La vendejo lokiĝis ie en interstrato de bulvarado, aĉetantoj malmultis, kaj Anna Nikolajevna tutajn tagojn pasigis preskaŭ sola. Ŝia unusola helpanto, la knabo Feĉjo, post matena tetrinkado ĉiam kuŝiĝis dormi. Li vekigis, kiam necesis kuri en manĝejon por alporti la tagmanĝon, kaj poste endormiĝis denove. Ĉiuvespere por duonhoron venis la mastrino, maljuna germanino Karolina Gustavovna, prenis la enspezon kaj riproĉis la junulinon, ke ŝi ne scipovas allogi aĉetantojn. Anna Nikolajevna ŝin terure timis kaj aŭskultis, ne kuraĝante diri eĉ unu vorton. La vendejo fermiĝis je la naŭa; veninte hejmen, al sia onklino, Anna Nikolajevna trinkis malfortanteon kun malfreŝaj ringbulkoj kaj tuj enlitiĝis.

Komence Anna Nikolajevna penis amuziĝi per legado. Ŝi akiris ĉie, kie eblis, romanojn kaj malnovajn magazinojn kaj diligente tralegis ilin paĝon post paĝo. Sed ŝi konfuzis la nomojn de herooj en romanoj kaj ne povis kompreni, por kio oni rakontas pri diversaj elpensitaj Jeanne-oj kaj Blanche-oj kaj por kio oni priskribas belegajn matenojn, kiuj ĉiuj similas unu al alia. La legado estis por ŝi ne ripozo, sed laboro, kaj ŝi forlasis la aferon. Strataj amindumantoj ne tre tedis ŝin per sia atento, ĉar ili ne trovis ŝin interesa. Se iu el la aĉetantoj tro longe parolis al ŝi afablaĵojn, ŝi foriris en la ĉambreton malantaŭ la vendejo kaj sendis Feĉjon anstataŭ si. Se oni alparolis ŝin, dum ŝi iris hejmen, ŝi, ne respondante eĉ unu vorton,

plirapidiĝis aŭ simple kuris ĝis sia pordo. Ŝi ne havis konatojn, ŝi korespondis kun neniu el siaj edukejamikinoj, kun la onklino ŝi interŝanĝis nur kelkajn vortojn tage. Tiel pasis semajnoj kaj monatoj.

Anstataŭe Anna Nikolajevna amikiĝis kun la mondo, kiu ŝin ĉirkaŭis, la mondo de papero, kovertoj, poŝtkartoj, krajonoj, plumoj, glueblaj, reliefaj kaj eltranĉeblaj bildoj. Tiu mondo estis por ŝi pli komprenebla, ol libroj, kaj rilatis al ŝi pli amike, ol homoj. Baldaŭ ŝi ekkonis ĉiujn specojn de papero kaj plumoj, ĉiujn seriojn de poŝtkartoj, donis al ili nomojn por ne uzi numerojn, parolante pri ili. Unujn ŝi ekamis, aliajn konsideris siaj malamikoj. Siajn favoratojn ŝi metis en plej bonajn lokojn en la vendejo. Al papero de unu Riga fabriko kun akvomarkoj, bildigantaj fiŝojn, ŝi donis la plej novan skatolon, al kies randoj ŝi algluis oran bendon. Glueblajn bildojn, prezentantajn tipojn de antikvaj egiptoj, ŝi lokis en apartan tirkeston, kien krom ili ŝi metis nur plumingojn kun kolombetoj sur la pinto. Bildkartojn, montrantajn “la vojon al la stelo”, ŝi ĉiun aparte ĉirkaŭvolvis per rozkolora papero kaj glufermis per oblato kun neforgesumino. Male, ŝi malamamis dikajn vitrajn, kvazaŭ satajn, inkujojn, malamamis striitajn linifoliojn, kiuj ĉiam kurbiĝis, kvazaŭ mokante ŝin, kaj volvaĵojn de onda papero por lampŝirmiloj, pufajn kaj fierajn. Tiujn aĵojn ŝi kaŝis en la plej foran angulon de la vendejo.

Anna Nikolajevna ĝojis, kiam oni aĉetis ŝiajn ŝatatajn aĵojn. Sed kiam tiu aŭ alia speco de tiaj aĵoj preskaŭ elĉerpiĝis, ŝi komencis maltrankviliĝi kaj eĉ kuraĝis peti de Karolina Gustavovna kiel eble plej baldaŭ enstokigi pli. Foje neatendite

forvendiĝis stoko da malgrandaj leterpesiloj, kiujn oni malofte aĉetis kaj kiujn Anna Nikolajevna ekamis pro ilia malfortuneco; la lastan vendis vespere la mastrino mem, kaj ŝi ne volis mendi ilin denove. Post tio Anna Nikolajevna ploris du tagojn. Sed kiam estis vendataj neŝatataj aĵoj, Anna Nikolajevna koleris. Kiam oni aĉetadis po tutaj dekduoj aĉajn kajerojn kun blua svaga ornamo sur la kovriloj aŭ aĉe presitajn poŝtkartojn kun portretoj de aktoroj, al ŝi ŝajnis, ke ŝiaj favoratoj estas ofenditaj. En tiaj okazoj ŝi tiel insiste admonis de la aĉeto, ke multaj foriris el la vendejo, aĉetinte nenion.

Anna Nikolajevna kredis, ke ĉiuj aĵoj en la vendejo ŝin komprenas. Kiam ŝi foliumis sian ŝatatan paperon, ĝiaj folioj susuris tiel afable. Kiam ŝi kisis kolombetojn sur plumingpintoj, ili tremetis per siaj lignaj flugiletoj. Dum kvietaj vintraj tagoj, kiam neĝis malantaŭ la prujnkovrita fenestro kun malbelaj rondoj de lampoj, kiam dum tutaj horoj neniu eniris en la vendejon, ŝi havis longajn konversaciojn kun ĉio, kio staris sur bretoj, kio kuŝis en kestoj kaj skatoloj. Ŝi atente aŭskultis senvortan paroladon kaj interŝanĝis ridetojn kaj rigardojn kun konataj aĵoj. Kaŝe ŝi dismetis sur la vendotablo siajn ŝatatajn bildojn — anĝelojn, florojn, egiptojn — rakontis al ili fabelojn kaj aŭskultis iliajn historiojn. Fojfoje ĉiuj aĵoj kantis al ŝi ĥore apenaŭ aŭdeblan lulkanton. Anna Nikolajevna aŭskultis ĝin, forgesante ĉion tiomgrade, ke enirantaj aĉetantoj malice subridis, pensante, ke ili vekis dormeman komiziron.

Antaŭ Kristnasko Anna Nikolajevna travivadis pezajn tagojn. Aĉetantoj venis aparte ofte. La vendejo estis plenŝtopita per arego da akrakoloraj, okultranĉaj kartonaĵoj,

per malbelegaj petardoj kaj orkoloraj fiŝoj en aĉe gluitaj skatoloj. Sur la muroj oni pendigis ŝirfoliajn kalendarojn kun portretoj de grandaj homoj. Estis homplene kaj nekomforte. Sed kompanse Anna Nikolajevna ripozis somere. La komerco preskaŭ ĉesis, nemalofte tago pasis sen eĉ kopeko da enspezo. La mastrino forveturis el Moskvo por tutaj monatoj. En la vendejo estis polve kaj sufoke, sed kviete. Anna Nikolajevna dismetis ĉie siajn ŝatatajn bildojn, en montrofenestroj metis antaŭen siajn ŝatatajn kraĵojn, plumingojn kaj frotgumojn. El kolora silka papero ŝi eltranĉis mallargajn bendojn kaj ĉirkaŭvolvis per ili la trivitajn ŝrank-kolonetojn. Ŝi laŭtflustre parolis kun siaj favoratoj, rakontis al ili pri sia infanaĝo, pri sia patrino kaj ploris. Kaj ili, kiel ŝajnis al ŝi, konsolis ŝin. Tiel pasis monatoj kaj jaroj.

Anna Nikolajevna eĉ ne pensis, ke en ŝia vivo io povas ŝanĝiĝi. Sed foje aŭtune Karolina Gustavovna, reveninte en Moskvon aparte kolera kaj kverelema, anoncis, ke estos ĝenerala inventarado. La sekvan dimanĉon sur la pordon estis algluita afiŝeto kun la surskribo "Hodiaŭ la vendejo estas fermita". Anna Nikolajevna angore rigardis, kiel la mastrino per siaj dikaj fingroj rekalkulis ŝiajn elektitajn glueblajn bildojn, tiajn delikatajn kaj fajnajn, fleksante la randojn, kiel ŝi krude ĵetis sur la tablon ŝiajn plej ŝatatajn plumingojn kun kolombetoj. En la varlibro, plenigita per singarda kaj pala skribo de Anna Nikolajevna, la mastrino faris krudajn notojn kun longaj strekoj kaj inkŝprucoj. Iel Karolina Gustavovna trovis mankanta multon: tutajn rismojn da papero, kelkajn grocojn da kraĵoj kaj diversajn apartajn aĵojn — stereoskopojn, lupeojn, kadrojn. Anna Nikolajevna estis konvinkita, ke ŝi neniam eĉ vidis ilin en la vendejo. Poste Karolina Gustavovna elkalkulis, ke la enspezoj ĉiumonate konstante malgrandiĝas. Tion ŝi insulte riproĉis al Anna Nikolajevna, nomis ŝin ŝtelistino kaj diris, ke ŝiaj servoj ne plu bezonatas kaj ŝi estas maldungita.

Anna Nikolajevna foriris plorante, ne kuraĝante kontraŭdiri eĉ unu vorton. Hejme ŝi devis, certe, aŭskulti skoldadon ankaŭ de la

onklino, kiu jen nomis ŝin nenifaranto, jen minacis ekprocesi kontraŭ la germanino por ne permesi ofendi la nevinon. Sed Anna Nikolajevna ne tiom maltrankviliĝis pro la perdo de la laboro kaj ne tiom turmentiĝis pro la maljusteco de Karolina Gustavovna, kiom suferis pro la disiĝo de la amataj aĵoj el la vendejo. Anna Nikolajevna pensis pri la reliefaĵ anĝeletoj, balanciĝantaj sur nuboj, pri la ĉarmaj kapoj de Mary Stuart, pri la papero kun akvomarkoj, bildigantaj fiŝojn, pri la konataj skatoloj kaj kestoj kaj ploregis senĉese. Ŝi rememoris la antaŭvesperan horon, kiam oni jam lumigis lampojn, rememoris siajn senvortajn konversaciojn kun la amikoj, la apenaŭ aŭdeblan ĥoron, sonantan de la bretoj, kaj ŝia koro disŝiriĝis pro malespero. Ĉe la penso, ke ŝi neniam, neniam plu povos intervidiĝi kun siaj favoratoj, ŝi ĵetis sin vizaĝaltere sur sian malgrandan liton kaj petegis la dion pri morto.

Post monato kaj duono la onklino bonŝance trovis por Anna Nikolajevna novan laborlokon, denove en papervendejo, sed en vigla, homplena strato. Anna Nikolajevna iris al sia nova laborejo kun korprema angoro. Krom ŝi, tie laboris ankoraŭ unu fraŭlino kaj junulo. Ankaŭ la mastro plejparton de la tago pasigis en la vendejo. Aĉetantoj multis, ĉar apude estis kelkaj lernejoj. La tutan tagon Anna Nikolajevna devis esti antaŭ la okuloj de aliaj homoj, pri-ridantaj kaj malestimantaj ŝin. Siajn antaŭajn favoratojn ŝi ĉi tie ne trovis. Oni mendis ĉion tra aliaj perantoj de aliaj fabrikantoj. Papero, kraĵoj, plumoj — ĉio ŝajnis ĉi tie senviva. Kaj kvankam estis kelkaj aĵoj samaj, kiel en "Bemolo", ili ne rekonis ŝin, kaj ŝi vane, trovinte minuton, flustris al ili iliajn plej tenerajn nomojn.

La sola plezuro por Anna Nikolajevna iĝis alproksimiĝi vespere, dum la vojo hejmen, al la fenestroj de sia antaŭa vendejo, fermiĝanta pli malfrue. Ŝi fiksrigardis tra la polva vitro en la konatan ĉambron. Malantaŭ la vendotablo staris nova vendistino, linda germanino kun bukloj sur la frunto. Anstataŭ Feĉjo estis alta junulo, ĉirkaŭ dekkvinjara. Aĉetantoj eliris el la vendejo ridante: ili bonhumoris. Sed Anna Nikolajevna kredis, ke ŝiaj konataj bildoj,

plumingoj kaj kajeroj memoras ŝin kaj amas ŝin, kiel antaŭe, kaj tiu kredo konsolis ŝin.

Longe Anna Nikolajevna revis, ke ŝi eniros ankoraŭfoje en la vendejon, rigardos denove al la malnovaj ŝrankoj kaj vitrinoj, montros al siaj favoratoj, ke ankaŭ ŝi memoras ilin. Ŝi kelkfoje promesis al si, ke ŝi faros tion hodiaŭ, sed ĉiam hezitis, aparte timante renkonti la mastrinon. Sed foje vespere ŝi vidis, ke Karolina Gustavovna eliris el la vendejo, prenis droŝkon kaj forveturis. Tio kuraĝigis la junulinon. Ŝi malfermis la pordon kaj eniris kortreme. La germanino kun bukloj sur la frunto jam preparis ĉarman rideton, sed, taks-rigardinte la aĉetantinon, nur iom klinis la kapon.

— Kion vi deziras, sinjorino?

— Donu al mi... donu skribpaperon... du dekduojn... kun fiŝoj.

La germanino degne ridetis, divenis, pri kio ŝi estas petata, kaj iris al la maldekstra ŝranko. Anna Nikolajevna perplekse kaj angore sekvis ŝin per la okuloj. Pli frue tiu papero kuŝis en skatolo kun orkolora rando. Sed la tiamaj skatoloj jam malestis; ilin anstataŭis aĉaj nigraj kestoj kun surskriboj: "4-a: 20 kop.", "Ministreja: 40 kop." En ŝrankoj en antaŭajn lokojn estis metitaj vitraj inkujoj. Amaso da onda papero okupis la tutan malsupran breton. Poŝtkartoj kun portretoj de aktoroj estis multloke ventumil-simile alnajtaj al la muroj. Ĉio estis movita, translokita, ŝanĝita.

La germanino metis antaŭ Anna Nikolajevna la paperon, demandante: "Ĉu tiun?" Anna Nikolajevna avido prenis en la manojn la belajn foliojn, kiuj iam scipovis respondi al ŝiaj karesoj; sed nun ili estis rigidaj, kiel kadavroj, kaj same palaj. Ŝi sopire ĉirkaŭrigardis: ĉio estis morta, ĉio estis surda kaj muta.

— Bonvolu pagi 35 kopekojn, sinjorino.

Eĉ la prezo estis ŝanĝita! Anna Nikolajevna pagis kaj eliris en la malvarmon, premante en la manoj la kunrulitan paperon. La oktobra vento penetris ŝin tra la mallonga eluzita palto. La lumo de lanternoj disfluis grandmakule en nebulo. Estis malvarme kaj senespere.

Tradukis el la rusa

Anna kaj Mati Pentus

Laŭda mencio en *Liro-2008*



Bjalistoko en literaturo

Bjalistokon en beletraĵoj oni ne priskribis tro amplekse. Serĉante menciojn pri ĉi tiu urbo ĉe la rivero Biała, oni trovas nenion krom nur unuopaj, ne ĉiam pozitivaj mencioj. Pli ofte Bjalistoko kaŝas sin sub nomo de neidentigita, provinceca urbo, en kiu okazas iu rakonto, kaj nur bona kono de la afero permesas malkaŝi konatajn stratojn kaj konstruaĵojn.

Pli da loko oni dediĉas al la palaco de Branicki, fiere nomata *Pola* aŭ *Podlaĥia Versajlo*, ĉefe en memorlibroj.

Elstara poetino Elżbieta Drużbacka en siaj poemoj priskribadis perfektecon de la kortego de la familio Branicki, substrekante belecon de la palaco mem kaj laŭdante la malŝpareman gastamon de la geposedantoj. Sejma deputito, kastelestro el Brześć kaj poeto, Marcin Matuszewicz, en siaj memornotoj mencias restadon de turka diplomato en la bjalistoka kortego:

*Tiu diplomato, ĉirkaŭ 60-jara, estis kompreneble afabla, saĝa kaj serioza laŭ sia personeco. Antaŭ ol la reĝo al Wschowa alvenis (el Dresdeno) li restis en Bjalistoko ĉe la granda kronhetmano dum nemallonga tempo, trovante tie al si ĉies estimon. Li scipovis ankaŭ famiĝi havante kun si turkan poeton, al kiu li devigis priverki Bjalistokon kaj Choroszcz, kun grandaj laŭdoj al la hetmano. Poste li mem tiujn kelkcent poemojn antaŭ la hetmano per poeteca voĉo ellegis kaj kopiojn de la poemoj donacis al la hetmano.*¹

Multaj eksterlandanoj, vojaĝintaj tra Podlaĥio, estis ravitaj de la urbo ĉe la rivero Biała. Friedrich Schulz skribis:

Bjalistoko, al kiu mi venis je la sepa vespere post dekseks-mejla vojaĝo, estas la plej freŝa kaj la plej bela el la ĝis nun viditaj

*urbetoj. Ĝi troviĝas en Podlaĥio. La stratoj estas rektaj, meze tre bone pavimitaj; la domoj, preskaŭ ĉiuj regule konstruitaj el brikoj, staras kun ia distanco inter si, kreitaj preskaŭ samstile, kun frontaj partoj unuetaĝaj direktitaj al la stratoj. La foirplaco estas larĝa, kaj ĝin ornamas konstruaĵo kun alta turo. La urbeto estas vigla. En preskaŭ ĉiuj dometoj aŭdeblas muziko, tra ĉiuj fenestroj rigardas kaj antaŭ dometoj staras grupetoj da homoj; iliaj staraj festecaj, ruĝiĝitaj kaj ŝvelaj vizaĝoj malkaŝas iuspecan ĝojon.*²

Simile priskribis Bjalistokon William Coxe, kiu vojaĝis preskaŭ samtempe³. Tamen antaŭ ĉio la vojaĝantoj dediĉis plej grandan spacon al la grandioza palaco de Branicki.

Joann Bernoulli skribis:

*... sekve ni vidas palacon. Ĝin oni konstruis tre bonstile, ĝi havas du alojn ĉirkaŭantajn la korton, kaj kun ĉefa parto ligas ilin kolonaro. Sur la korto, krom ovoforma gazono limigita de arketo el etaj floroj, ĉe kies fino staras triumfa pordego, videblas obelisko, kaj sur ĝi grifo (blazono de Branicki) staranta sur globo.*⁴

La palaco kaj ties posedantoj estis temo en multaj romanoj de unu el la plej verkemaj polaj verkistoj, Józef Ignacy Kraszewski. En sia romano *Hetmanaj pekoj*. *Bildoj de la fino de la 18a jarcento* li skribis:

Dum la regado de Aŭgusto la 3a, ne ekzistis en la tuta Pola Reĝlando kaj Litvo palaco pli grandioza, pli grandsinjorece prizorgata, ol la pola Versajlo, en kiu loĝis tiutempa Granda Hetmano, Jan Klemens el Ruszcza Branicki, la lasta heredanto de la malnova

familio, kiu eĉ en la epoko de Pjastoj estis unu el la plej riĉaj, — ankaŭ heredanto de Hetmano Czarniecki laŭ la patrino linio. Veras, ke tiu grandioza palaco estis tute freŝa, kaj ne troveblis en ĝi spuroj de antikveco: ĝi estis loko kvazaŭ tuŝita de magia vergo kaj al podlaĥia ebenaĵo transportita de sub alia ĉielo. — La magia vergo estis volo de unu homo kaj liaj milionoj. Oni rakontis tiutempe, ke iom pli frue, probable antaŭ la kreo de la Versajlo, kiam la urbeto bruliĝis, Hetmano Branicki diris, ke li preskaŭ ĝojas pro tiu fakto, ĉar jen li povas, laŭ sia imago, nove el cindroj ĝin centoble pli grandiozan fari.

*Ankaŭ nun la stratoj de Bjalistoko aspektis kvazaŭ en fremda loko, plenaj de elegantaj biendomoj kun ĝardenoj, blankaj, puraj, ridetantaj: kaj tre multaj el tiuj dometoj, posedataj de oficistoj, korteganoj, oficialuloj, francoj kaj germanoj, konsistigantaj la tre grandan kortegon de la Hetmano, estis dekoritaj laŭ la maniero ĉe ni eksterordinara, kaj estis plenaj je komfortaĵoj en nia lando neatenditaj.*⁵

Ankaŭ la juna frato de Józef, fama roman- kaj dramverkisto Kajetan Kraszewski, ofte priskribis la riĉan historion de la bjalistoka palaco:

*Fieris tiutempa Bjalistoko ankaŭ pri grandega brikdomo uzata kiel gastejo aŭ kafejo. Tiu taverno, preparita laŭ fremda maniero, troviĝis apud la ĉefa, larĝa vojo angule, regis ĝin Andruszko aŭ lia edzino, kies pasinta vivo onidire fiŝarĝis la pasintecon de Branicki.*⁶

Pli diskreta en siaj memorlibroj estis grafino Anna Wąsowiczówna. Pri la bjalistoka palaco ŝi skribis:

*Valoraj francaj tapetoj, speguloj, iloj, dekoraĵoj similis la versajlan stilon. Oni eĉ ne povas imagi grandiozon de ludsalonoj kaj antaŭĉambroj dekoritaj per marmoraj kolonoj.*⁷

Plurajn mirojn pri la palaco de Braniccki ni trovas en memorlibroj, same interesa ŝajnis esti vivo de ĝiaj loĝantoj, pri kio pli aŭ malpli diskrete skribis, ekzemple, fratoj Kraszewski kaj Hanna Muszyńska-Hofmanowa. Tamen la urbo mem estis neglektata kompare kun la belega palaco, kaj tia ĝi restis longe, eĉ dum la tempo de la plej granda prospero en la epoko tre interesa en si mem.

La fino de la 19a jarcento estis por Bjalistoko tempo de eksterordinare dinamika evoluo. Danke al la konstruo de la fervojo inter Varsovio kaj Peterburgo la urbo fariĝis *Promesita Tero* al multaj serĉantoj de laboro kaj de socia promociigo. Ĉi tie kruciĝis religioj: romkatolika kaj juda, protestanta kaj ortodoksa. En la ĉefa foirplaco, nomata Bazara Placo, super kiu altis la Urbodomo, kvazaŭ en la legenda Babelturo sonis multaj lingvoj. Ĉi tiu loko tiom fascinis la dek-jaran Ludovikon Zamenhof, ke pri ĝi li verkis sian unuan verkon. Ĝi estis kvinparta dramo *Babelturo*, kies ideofonto estis bjalistoka Urbodomo kaj ĝin ĉirkaŭanta bazaro.

La teksa industrio iĝis la ĉefa industrio de la Manĉestro de la Nordo, kiel oni nomis Bjalistokon. Aperis novaj fabrikoj: de Małka Blochowa, Eugeniusz Becker, Hendricks, fratoj Commichau, Ch. Nowik, B. Polak, D. Szapiro, O. Trylling. Bjalistoko dankoŝuldas al tiuj alvenintoj (el multaj eŭropaj lokoj) ne nur evoluon de industrio, sed ankaŭ grandan influon al kultura vivo, tre riĉan, ĉar kreatan ja de multaj nacioj. Apud fabrikoj aperis belegaj urbopalacoj iĝantaj kulturdiskutejoj de la urbo, ekzemple, la domo de Commichau ĉe la strato Warszawska. Hugo Commichau lasis jenan priskribon de Bjalistoko:

La urbo Bjalistoko tiam havis eble 20 mil loĝantojn, almenaŭ tri kvaronoj da ili estis judoj. Ĉar estis ĉi tie preskaŭ nur unuetaĝaj domoj, la urbo estis pli vasta ol urboj

*same homplenaj en la okcidenta Eŭropo. La stratojn kovris mal ebena pavimo, same kiel trotuarojn. Ĉar mankis akvotuba sistemo, preskaŭ ĉiu domo estis ekipita de puto. Stratoj ne estis lumigitaj, nur sur la ĉefa placo kaj ĉe la policejo brulis kerosena lampo, sed nur dum senlunaj noktoj. Stratojn oni balais unufoje tage.*⁸

Pri sia familia urbo skribis verkisto kaj poeto Zusman Segalowicz en sia membiografia trilibro *Zeliks jorn*. Elstara muzikisto Nicolas Slonimsky en sia libro *Absoluta aŭdokapablo* lasis tre interesan rememoron pri Bjalistoko, la familia urbo de sia avo, Ĥaim Zelig Slonimski, matematikisto, verkisto kaj inventisto.

Verŝajne la plej interesan kaj la plej profudan vidon al la urbo lasis Maria Dąbrowska en la jaro 1924. Ŝajnas ke rimarkoj de la verkistino ne estis nur ŝia persona opinio pri Bjalistoko:

*Jam post sunsubiro ni alvenas al Bjalistoko. Al tiu abomena urbetaĉo, al tiu malpura truo, al tiu rubujo kun nedifinita, kameleona vizaĝo... En Bjalistoko, se oni sin prezentu "ĉe iu" — oni sin prezentu ĉe Ritz. Jen estas unuaklasa personeco de Bjalistoko, ĉar hotelon kun tia komforto kaj pureco havas neniu provinca urbo en la landoparto iam okupata de Ruslando. Jen estas la sama Ritz al kiu en Londono oni iras al "five o'clock tea".*⁹

Rimarkoj de Maria Dąbrowska pri promenado en la urbo, bedaŭrinde, ne montras Bjalistokon bone:

Aĉaj, trietaĝaj brikdomoj estas konstruitaj el kremkoloraj, pale rozkoloraj kaj ruĝaj brikoj, meta-taj strie, estas trapikitaj, trodekoritaj, troabomenaj,

sed poste ŝi skribas ankaŭ:

*Bjalistoko havas potencon iĝi tre bela — kontraŭ tre malgranda prezo. Ĝi havas ĉion, kio mankas en Varsovio — larĝajn perspektivojn, malplenajn terenojn, multan arboverdon, oni eĉ la urbon ne devas alikonstrui.*⁹

La intermilita Bjalistoko estis speciala loko, kie videblis kunlaborado de ĉiuj nacioj loĝantaj tiurbe. La ligilo estis kulturo — ankoraŭ nova, formiĝanta post la regajno de la sendependeco, serĉanta apogon en iama, forgesita grandiozece de Bjalistoko, sed ankaŭ pliriĉigata de freŝaj aspektoj alportataj de novaj urbanoj.

Komunaj bildekspozicioj, poeziaj vesperoj, fine teatro kaj Esperantomovado, tre grava por promociado de Bjalistoko — ĉio ĉi formis novan personecon de la urbo. Sed la Dua Mondmilito kripligis Bjalistokon — 80% de la konstruaĵoj estis tute detruitaj. De la centmilhoma loĝantaro restis malpli ol duono. Unu el la plej bonaj postmilitaj polaj poetoj, Wiesław Kazanecki, naskiĝinta en Bjalistoko, skribis en sia poemo *Foto — Malnova Bjalistoko*:

Sed ne plu estas la urbo kun vojetoj inter lignaj palisaroj, kun tegoloj flikitaj de neĝo. Kaj pavimaj ŝtonoj en judaj ĉapetoj kverelis kontraŭ ĉaraj radoj dum foirtago. Kaj ne plu estas la hospitalo kiu aŭdis mian unuan krion, eltranĉita funiklo, per ruboj cikatriĝis la tegmento. Karbiĝintaj judaj manteloj kolektiĝas dum sunsubiro, sepopan kandelington volvas per luna lumo, kiel erojn de rosario kalkulas bruligitajn ripojn de la sinagogo.

La nuntempa Bjalistoko estas moderna urbo, kreanta daŭre sian historion kaj kulturan personecon. Multaj junaj verkistoj kaj poetoj, naskiĝintaj en aŭ ligitaj kun la urbo, subtenas ĉi-procezon, pli kaj pli da spaco dediĉante en sia verkaro al Bjalistoko.

Tradukis el la pola
Przemysław Wierzbowski

Referencoj

1. Moscicki H., *Białystok*. 1933, p. 51.
2. *Polska stanisławowska w oczach cudzoziemców*. PIW, 1963, Vol. II, p. 399.
3. Samloke, Vol. I, p. 677.
4. Samloke, Vol. I, p. 344.
5. Kraszewski J.I. *Grzechy hetmańskie*: obrazy z końca XVIII wieku. Warszawa, 1975, dtr. 10.
6. Dunin Koziński Z. *Białystok w XVIII w*. Białystok, 1932, p. 61.
7. *Dziennik Białostocki*, 8. 03. 1936, №67, p. 4.
8. Tomecka B., Szczygieł-Rogowska J. *Cmentarz ewangelicki w Białymstoku*. Białystok, 2008, p. 11.
9. Dobroński A. Cz., Szczygieł-Rogowska J. *Białystok, lata 20-te, lata 30-te*. Białystok, 2003, p. 91.

Jolanta Szczygieł-Rogowska, naskiĝinta en Bjalistoko, estas historiistino. Dum 25 jaroj ŝi laboras en la Podlaĥia Muzeo. Ŝi serĉas spurojn de iamaj loĝantoj de Bjalistoko kaj priskribas ilin en siaj verkoj. Kune kun Daniel Boćkowski ŝi eldonis la libron *Iam okazis...* Kun profesoro Adam Dobroński ŝi priskribis historion de *La 1920-aj, la 1930-aj jaroj*. Kun Barbara Tomecka ŝi verkis *Protestantan tombejon en Bjalistoko ĉe la str. Wasilkowska*. En 1999 ŝia verko estis ekspozicio *Bjalistokano Ludoviko Zamenhof kaj lia verkaro*. Nun, kune kun Andrzej Lechowski, ŝi preparas scenaron de multimedia ekspozicio en la Centro Zamenhof en Bjalistoko.

La Revuo

La Revuo estas la unua vera literatura gazeto en Esperanto. Ĝia unua numero aperis la 1an de septembro 1906 en Parizo ĉe la fama eldonejo *Hachette*, kun kiu Zamenhof estis kontrakte ligita ekde 1901.

Tegmentita de ĉi tiu solida eldonejo, *La Revuo* aperis akurate kaj bonkvalite, oni neniam vidis en ĝi — bedaŭrinde, oftajn en la Esperanta gazetaro — plendojn pri malbona financa stato.

La Revuo fondis kaj direktis franca sciencisto Carlo Bourlet; ĝi estis kompetente redaktata de barono Félicien Menu de Ménil, konata ankaŭ kiel la komponinto de la Esperanta himno *La Espero*.

La Revuo havis subtitolon “Internacia monata literatura gazeto kun konstanta kunlaborado de D-ro L.L. Zamenhof, Aŭtoro de la lingvo Esperanto”. *La Revuo* estis la dua Esperanto-gazeto, kun kiu Zamenhof estis forte ligita. Sed kontraste al (*La Esperantisto*, Zamenhof nun ne devis okupiĝi pri tedaj redaktaj aferoj, nek verki bagatelaĵojn kaj primovadajn komentojn. *La Revuo* estis fondita, ke li povu aperigi siajn tradukojn. Kaj la traduk-listo estas impona.

Plej grave estis, ke *La Revuo* publikigis fragmentojn el la Zamenhofa traduko de la *Biblio*, la plej legata verko en la mondo: *La Predikanto*, *La Psalmaro*, *Genezo*, *Eliro*, *Levidoj*, *Nombroj*, *Readmono*. Sed ankaŭ aliaj tradukoj de Zamenhof aperis en ĉi tiu gazeto: *Esperanta Proverbaro* kaj prozaĵoj de Andersen, Orzeszko, Ŝalom Aleĵhem, Heine.

Okulfrapas la nombro de teatraĵoj: *La Revizoro* de Gogol, *Ifigenio en Taŭrido* de Goeto, *Georgo Dandin* de Moliero, *La Rabistoj* de Ŝilero. Krome en ĝi aperis ankaŭ liaj *Kongresaj Paroladoj* kaj *Respondoj*. Ĉio ĉi poste aperis (kaj reaperis) libroforme.

Danke al la kunlaboro de Antoni Grabowski, Kabe, Henri Vallienne, Émile Boirac, Edmond Privat kaj aliaj gravaj aŭtoroj *La Revuo* estis la plej prestiĝa Esperanta revuo antaŭ la unua mondmilito.

En la unua numero de *La Revuo* mankas atendebla alparolo de la legantoj, kvazaŭ ĝia apero estus natura kaj ne bezonanta iajn ajn pravigojn. Nur fine de la revuo, en la rubriko *Kroniko*, sekvas jena *Avizo*:



Nia legantoj vane serĉus, en tiu kroniko, detalajn raportojn pri la mondo esperantista, ĉar ni tute ne intencas konkurenci la poresperantajn propagandajn ĉu naciajn ĉu internaciajn gazetojn. *La Revuo* estas kaj estos ĉiam *pure literatura*. Ĝi ne estas interesperantista al ĉiuj malfermata diskut-ejo. Por ni, Esperanto estas *fakto*, kaj ni uzas ĝin tia, kia ĝi estas. Espereble ni tiamaniere ankaŭ helpas al ĝia disvastiĝo, sed malrekte, pruvante ĝian utilecon kaj literaturecon.

Literaturaj konkursoj jam iĝis tradicio ĉe la Esperantaj revuoj. Ankaŭ *La Revuo* ne iĝis escepto, anoncinte en la unua numero pri *Grava konkurso* pri originala prozaĵo. Pri ĝi aperis detala komentario de la juĝantaro (Boirac, Kabe, Lambert), kiu listigis la plej oftajn erarojn en la ricevitaj konkursaĵoj. Ĝi ankaŭ donis konsilojn pri bona stilo. Premiado kaj malkaŝado de la nomo de la unua gajninto (franco René Artigues) okazis en speciala kunveno tuj post la Kembriga UK (1907). Sekvis pliaj konkursoj, inter ili, tiu por difini la plej bonan stiliston-literaturiston, en kiu unuarangiĝis Kazimierz Bein (Kabe), aŭ la poezia konkurso *Floraj Ludoj*, kies unua reĝino iĝis Marie Hankel.

La Revuo aspektis pli libre ol revue: dense presitaj tekstoj, manko de grafik-aĵoj aŭ bildoj, escepte de tutaĵaj foto-portretoj. Sed tiuj portretoj presitaj sur bona glacea papero estis veraj artaĵoj. Komprenible, en la unua numero foto de la Majstro, sed estis ankaŭ la trio por

la Tria, kaj la kvaro por la Kvara, la plej bona stilisto Kabe kaj la aktoroj, prezentintaj *Ifigenion en Taŭrido*... Neniu alia gazeto havis similan fotogalerion.

La detale strukturita indekso (lokita komence de la binditaj kolektoj) ebligas rapidan serĉadon.

Jen la divido: *Literaturo* (originala kaj traduka), *Teatraĵoj*, *Poezioj*, *Diversaĵoj*. Al *Diversaĵoj* apartenis kongresaj paroladoj de Zamenhof, liaj lingvaj respondoj, prikongresaj artikoloj, kulturaj eseoj kaj nekrologaj eseoj pri divers-fakaj renomuloj.

Enorman atenton ricevis la 4a Universal Kongreso en Dresdono (1908). Carlo Bourlet sur dek kvar paĝoj raportis pri sia vizito al Dresden, prepariganta akcepti la mondan esperantistaron. Duoble pli granda estas lia artikolo pri la efektiviĝinta kongreso. Ankaŭ en aliaj jaroj la kongresaj raportoj venas ĉefe, sed ne ekskluzive, el lia plumo.

Bibliografia rubriko prezentas, pli aŭ malpli amplekse, librojn kaj muzikaĵojn. Foje ankaŭ Esperanta gazetaro estas prezentata. En la rubriko *Kroniko* oni trovas ĉefe priesperantajn informojn. En septembro 1912 startis la rubriko *Internacia vivo*, en kiu aperis artikoloj el *La Vie Internationale* pri tutmondaj problemoj kaj sciigoj pri okazontaj kaj okazintaj konferencoj, kongresoj kaj kunvenoj.

Oni ne povas supertaksi la organizajn talentojn de Carlo Bourlet, al kiu ni ŝuldas la fortikiĝon de nia literaturo. Jene Zamenhof esprimis tion ĉe la tombo de Bourlet:

Al lia senlaca iniciatado, instigado kaj helpado ni ŝuldas grandan riĉiĝon de nia literaturo kaj aperon de la plej gravaj verkoj pri kaj en nia lingvo.

Post la morto de Bourlet, en oktobro 1913 la nova direktoro de *La Revuo* estis elektita Félicien Menu de Ménil.

La Revuo aperis dum ok plenaj jaroj, ĝia lasta numero estis tiu de aŭgusto 1914 — la eksplodo de la unua mondmilito malhelpis ĝian pluan eldonadon. Ĉiumonataj 48-paĝaj numeroj havigis suman amplekson de 576 paĝoj jare (kelkfoje aldoniĝis 4-8 pliaj paĝoj). Al ili aldoniĝis rozkoloraj paĝoj kun reklamoj, kiuj mankas en la binditaj kolektoj. Dum la ok jaroj aperis 96 numeroj sur entute 6144 paĝoj.

Ni resumu ankoraŭfoje la ĉefajn atutojn de *La Revuo*: *Hachette*, Zamenhof, la konkursoj, la Universalaj Kongresoj.

Halina Gorecka

La unua eldonaĵo sub la marko de E@I aperis nur en 2003, tamen la fruktoj de tiu eldonlaboro jam estas sufiĉe konataj inter esperantistoj. Kvankam kelkaj eroj jam estis priskribitaj ĉi-rubrike, nun ni prezentas ilin unuafoje komplete, por ke oni havu bonan superrigardon pri la tuta “eksterreta” agado de Edukado@Interreto.

La presaĵoj aperis komence kiel flanka okupo, kiun instigis la uzantoj de retaj projektoj de E@I (ekz. KD *Lernu!* kaj la libro *Komputeke*). Same plej multaj eldonaĵoj estas rezulto de la reta kunlaboro de internacia teamo. La listo sekvas laŭ la vico de la varo-ajroj laŭkalendare.



[2003] KD *Lernu!* Danke al la teamo de *Lernu!* ekestis tiu ĉi eksterreta plurlingva versio de la paĝaro *Lernu!* En 2005 danke al kunlaboro kun francaj esperantistoj de JEFO la dua eldono estis presita en kelkmil ekzempleroj kaj ĝi ankoraŭ aĉetblas.

[2005] *Manlibro pri instruado de Esperanto* estas eldonita kune kun ILEI, sub la redaktora gvido de Katalin Kováts. Kontribuis al ĝi 13 aŭtoroj. La *Manlibro* estas rezulto de la projekto “Flugiloj de Malfacila Vento” kaj uzata dum ĝiaj seminarioj kiel instru-libro. Aperis jam tri eldonoj, la kvara eldono estas pretigata.



[2006] DVD *Esperanto elektronike*. Internacia teamo sub la gvido de Peter Baláž realigis prezentindan diskon kun bunta enhavo. Ĝi celas du publikojn. Al esperantistoj ĝi donas amason da interesa Esperanto-materialo (libroj, artikoloj, muziko...), al neesperantistoj ĝi liveras informojn pri Esperanto, kursojn, vortarojn... Bona antaŭmenda strategio ebligis grandan eldonkvanton: entute 12 mil pecoj! *Esperanto elektronike* havis du eldonojn — la unua 9000 ekz., la dua — iom ampleksigita kaj korektita —



[2007] *Vikipedio — praktika manlibro*. Yves Nevelsteen, nuna estraro de E@I, debutis per furora verko pri furora fenomeno. Ĝi estas utila manlibro por ĉiu, kiu interesiĝas pri la libera reta enciklopedio Vikipedio. Temas pri plenkolora 40-paĝa poŝlibreto. 1000 ekzempleroj, presitaj en marto 2007, forvendiĝis ene de unu jaro. Anstataŭ reeldono E@I decidis eldoni novan verkon pri Vikipedio — pli ampleksan tekston de Ziko van Dijk.

3000 ekz. La unua eldono havis tradukojn al 20 lingvoj, la dua jam al 26 lingvoj. Ĝi daŭre estas mendebla ĉe dvd@ikso.net (pli da informoj ĉe: www.esperantodvd.net)



[2008] *Komputeke* estas la dua furora verko de Yves Nevelsteen, kiu dum du jaroj kolektadis kaj ordigadis prikomputilajn vortojn en Esperanto. La libro enhavas pli ol 7500 terminojn de komputila fako anglo-Esperante en la alfabeto ordo. La papera eldono estas rezulto de la reta projekto www.komputeke.net, kiu celas liveri la komputilan terminologion en pluraj lingvoj. La tuta eldonkvanto (500 ekz.) estas preskaŭ forvendita. E@I pripensas novan eldonon.




[2008] KD *Esperanto*. Danke al la kunlaboro de E@I (kiu kreis kaj urbo Bjalistoko (kiu pagis) aperis la 10an de septembro en la pollanda tagjurnalo *Gazeta Wyborcza* ĝis nun la plej multnombra Esperanto-eldonaĵo elektronika. La kompakta disko kun simpla nomo *Esperanto* estis eldonita en 400.000 ekzempleroj. La disko estas dulingva (pole kaj Esperante) kaj celas prezenti Esperanton al ĝenerala publiko per luda, amuza formo.



[2008] *Vikipedio por vi*. Ziko van Dijk, konata (ne nur en Esperanta medio) historiisto kaj vikipediisto aŭtoris ĉi tiun 60-paĝan verkon, kiu eldoniĝis en 1000



ekzempleroj. Ĉi tiu detala verko klarigas la fenomenon Vikipedio kun multaj konsiloj, klarigoj kaj paŝo post paŝo gvidas leganton iĝi facile ne nur uzanto de tiu reta enciklopedio sed ĝia aktiva kontribuanto.



[2008] DVD *Esperanto estas...* Internacia kunlaboro sub la gvido de talenta brazilano Rogener Pavinski (nuna estraro de TEJO) realigis modernan informfilmon pri Esperanto, dediĉitan al ĝenerala publiko. Ĝi celas prezenti Esperanton kiel vivan, modernan kaj plene funkciantan internacian lingvon kun multaj trajtoj. La filmo havas 43 minutojn kaj 6 partojn, ĉiu prezentanta alian aspekton de Esperanto. Entute la filmo havas voĉ-registon en 10 lingvoj kaj subtekstojn en 26 lingvoj! Ĝi aperis en 2 eldonoj — dividitaj laŭlingve (versioj A kaj B), ambaŭ po 2000 pecoj. Pli da informoj troveblas ĉe www.esperantodvd.net. La filmoj spekteblas ankaŭ ĉe: www.esperantoestas.blogspot.com

Krom libroj kaj diskoj aperis ĉe E@I ankaŭ du reklamaj Esperanto-ĉemizoj, krome ĵetteleroj kaj pluraj ĝlumarkoj. E@I kunfinancis ankaŭ eldonon de faldfolio pri Vikipedio.

Menciindas la financa subteno de Esperantic Studies Foundation, kiu kontribuis al pluraj eldonaĵoj de E@I, kaj sen kies helpo ne povus pluraj verkoj aperi. Kelkaj eldonaĵoj estas daŭre mendeblaj de E@I. Sed atentu, ke E@I ne zorgas pri etkvantaj mendoj — pri tiuj kontaktu funkciantajn libroservojn.

Peter Baláž

E@I-kunordiganto

petro@ikso.net

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero) ISSN 0299-6987

LA GAZETO

MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA

Petu provnumeron ĉe: LA GAZETO
12 sous la Ville, 55210 CREUË (Francio)

gazeto@aol.com <http://www.lagazeto.com>

Peceto de Ĉinio en via hejmo

Esperanto kunligas nin: [Artikolaro] / Antaŭparolo de Chen Haosu. — Pekino: Ĉina Fremdlingva Eldonejo. 2008. — 223 p., il.

La libro *Esperanto kunligas nin* vere estas trezoro. La artikolaro enhavas bonan kolekton da vojaĝimpresoj, raportoj, rememoroj de eksterlandaj esperantistoj pri Ĉinio. Dum la pasintaj tridek jaroj Ĉinion vizitis esperantistoj el Italio, Germanio, Hungario, Francio, Japanio, Israelo, Hispanio, Vjetnamio kaj el aliaj landoj.

Ankaŭ estas zorge kolektitaj similaj raportoj de ĉinaj esperantistoj, kiuj vizitis la samideanojn en Azio, Ameriko kaj Eŭropo. Malgraŭ ke ordinaraj ĉinoj, laŭ la vortoj de germanaj esperantistoj, vivas modeste, ankaŭ ili vizitas grandan mondon. Dum la periodo ĉinaj esperantistoj estis en Belgio, Nederlando, Svislando, Hispanio, Japanio, Kanado, Usono, Koreio, Germanio kaj en aliaj landoj.



Ambaŭ tekstopartoj estas bona informilo pri Ĉinio kaj ties esperantistoj. Apud la esperantlingva teksto estas la sama teksto en la ĉina lingvo. Ĉiujn artikolojn ornamas la fotoj de aŭtoroj.

Certe, la artikolaro estas refreŝiga memorilo por ĉinoj pri la mondo kaj por mondaj esperantistoj pri Ĉinio. Estas bona ideo eldoni similajn artikolarojn surbaze de materialo de *El Popola Ĉinio* kaj *La Mondo* pri kulturo, arto, antikva historio, pri naciaj minoritatoj, pri moroj kaj kutimoj, pri E-movado, pri moderna evoluo de Ĉinio.

Aĉetinte la libron, ĉiu havos peceton de Ĉinio en sia hejmo.

Anatolo Sidorov



Malpli interesa ol UEA mem

van Dijk, Ziko. *La Asocio*: Skizoj kaj studoj pri la historio de UEA. — Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 2008. — 301 p., il.

En sia pasint-jara libro pri UEA (*Utila Estas Aliĝo*) Ulrich Lins skribis enkonduke:

Plena analizo de la historio de UEA restas tasko farota, kaj aldonis, ke per sia libro li volas “stimuli al pliaj esploroj” (p. 7).

Pied-note li referencis “kompletige” al *Lingvo kaj popolo* (2006) de Tonkin, sed ne al la sam-jara disertacio de Marcus Sikosek (la knaba nomo de la nuna Ziko van Dijk). Certe nek ĉi epizodeska disertacio nek la recenzata *La Asocio* estas la “plena analizo” kiun celis Lins.


La libro rezultas el fosadoj de la aŭtoro plenumitaj inter 2003 kaj 2005 en la roterdama sidejo de UEA.

La verko konsistas el du partoj: en la komenca troviĝas iom larĝa prezento de la historio de Biblioteko Hodler (kvankam sen esencaj novaĵoj), analizo de la divers-epokaj statutoj de UEA (ĉapitro aparte teda) kaj (historiografia?) prezento de la ĉefaj Esperanto-historioj (ĉapitro sen rekta rilato al UEA). Ĉi lastan ĉapitron karakterizas granda suprajeco. Por ekzemplo Dijk riproĉas al Korĵenkov (p. 135):

...Korĵenkov misuzas la piednotojn por aldonaj informetoj kaj komentoj, kiujn li ial ne volis meti en la kutiman [kurantan? — R.H.] tekston

kaj riproĉas la rusion pro ties ne-uzo de la sikoseka kongres-fabelaro *Sed homoj kun homoj*...

La duan parton de la mikspoto konsistigas deko da epizodoj el la historio de UEA. Pluraj restas sen baza informa valoro. Io mirigas ĉe historiisto (aŭ ĉu Sikosek-van Dijk tamen estas nura movadulo?): lia vitriola sinteno al Ivo Lapenna kiu havas nenion komunan kun la sobro de Lins. Ĝi sentiĝas aparte akre en la fina ĉapitro subtitolita “Kial Lapenna ne fariĝis heroo de Novjorko”. Temas pri la subskribo-kampanjo de la jaroj 1966 k.s. kiu mobilizis la tiaman membraron de UEA kaj donis okazon por vasta informado pri Esperanto. La demandon pri la intenco de Lapenna van Dijk respondas per diro de Victor Sadler (kvazaŭ el ĝi li ricevus revelacion): “Private Lapenna diris al Sadler ke li lanĉis la kampanjon por havi temon por kontakti la publikon, kaj por



doni al la esperantistoj ion, pri kio ili povas okupiĝi.” (p. 287) Ĉu io nova por Dijk naskita en 1973 kaj 14-jara kiam Lapenna mortis? Al siaj spekulativoj li tiel mem fortiras ĉian bazon.

Por distri kiun li rakontas la historion pri laŭdire geja kongres-sekretario Nicolaison kaj ties eksigo el la ofico? Tiaĵoj impresas jam nenion.

Historion de UEA aŭ almenaŭ gravajn brikojn por ties konstruo mi imagas alia. Ĝis nun ni apenaŭ ion scias pri gvidaj figuroj en la prezidanta ofico, por ekzemplo: Bolingbroke Mudie, Canuto, Liniger (kiu konas la nomon?), Malmgren, Stettler, Yagi k. a. Ĉu ili direktis la agadon, donis impulsojn aŭ estis nuraj figuroj galionaj? Kian redaktan politikon por la UEA-revuo havis Auld, Ertl, Fettes, Goldsmith, Hodler, Jakob, Marček, Milojević, Privat, Sadler, Zacho? Kio pri la Belartaj Konkursoj kaj ties efektiva rolo en la literatur-historio de Esperanto? Kio pri la Internaciaj Someraj (poste Kongresaj) Universitatoj kaj ties kontribuo al la utiligo de Esperanto por scienca laboro? Kio pri la labor-planoj de UEA, ilia efektivigo, fiasko aŭ sukceso? Kio pri la eldonaĵoj de UEA dum tuta jar-cento (kial mankas bibliografio)? Pri ĉio ĉi silentas same Sikosek kiel van Dijk. Li ja allasas, ke la epizodoj en la dua parto de la libro estas “iom pli ĵurnalisme verkitaj” (p. 289). Nu, sed kia ĵurnalismo?

Bilancio: eĉ la Esperanta Civito devos agnoski, ke UEA kaj ties historio estas pli interesaj ol ĉi tirkest-vakiga artikolaro apenaŭ atento-kapta.

Reinhard Haupenthal

La libro servo de UEA bone vendis en 2008

La libro servo de UEA havas laŭdindan kutimon ĉiujare resumi la vendostatistikon. Laŭ la ĵusa Gazetara Komunikado de UEA, la gvidilo *Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA*, lanĉita en la 93a UK, estis la plej furora titolo de la Libro servo de UEA en 2008 kun 349 venditaj ekzempleroj. La jarvendoj sumiĝis je 125.125 eŭroj (122.420 eŭroj en 2007). Estis venditaj 13 mil 707 ekzempleroj de 2 mil 554 malsamaj libroj kaj diskoj, ne enkalkulante insignojn, glumarkojn k.s.

UEA diskonigis du listojn. La resuman liston ("vendoj entute") influas mendoj de aliaj libro servoj por la libroj de UEA. La alia listo montras vendojn al individuaj klientoj. La kongresa libro servo estas traktata, kvazaŭ ĝi estus unu granda ekstera kliento. En la listo de ĉiuj vendoj 13 titoloj el 20 estas eldonaĵoj de UEA/TEJO kaj en tiu de unuopaj vendoj 9. En la suba listo la roterdamaj eldonaĵoj estas asteriskitaj.

Vendoj entute

<i>Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA*</i>	349
<i>Pasporta Servo: listo de gastigantoj*</i>	284
<i>Vojaĝo en Esperanto lando</i> , Boris Kolker*	229
<i>Utila Estas Aliĝo</i> , Ulrich Lins*	214
<i>Poŝamiko</i> , B. Allée & K. Kováts	186
<i>Gerda malaperis!</i> , Claude Piron	181
<i>Tuj apude</i> , Humphrey Tonkin*	170
<i>La Komuna Eŭropa Referenckadro*</i>	145
<i>Saluton!</i> , A. Childs-Mee*	107
<i>Ksenofobia gvidlibro al la nederlandanoj</i> , R. Bolt/S. Davies	106
<i>Vivo de Zamenhof</i> , Edmond Privat*	93
<i>Initiation théorique et pratique à la langue internationale Esperanto</i> , P. Denoel	91
<i>Bona Espero</i> , Roman Dobrzyński	89
<i>La Trezoro</i> , H.M. Al-Amily*	85
<i>Naturaj vortordoj en Esperanto</i> , Wim Jansen*	81
<i>Vikipedio — praktika manlibro</i> , Red. Y. Nevelsteen	69
<i>Manlibro pri olimpikaj vortoj</i>	66
<i>Faktoj kaj fantazioj</i> , Marjorie Boulton*	65
<i>Lingvo kaj popolo</i> , Humphrey Tonkin*	65
<i>Internacia Kongresa Universitato 2008</i> , Red. J.A. Vergara*	64

Unuopaj vendoj

<i>Pasporta Servo</i> , listo de gastigantoj*	67
<i>Ksenofobia gvidlibro al la nederlandanoj</i> , R. Bolt/S. Davies	42
<i>Beletra Almanako 2</i>	35
<i>Utila Estas Aliĝo</i> , Ulrich Lins*	30
<i>Dio, psiĉjo kaj mi</i> , Claude Piron	28
<i>La Trezoro</i> , H.M. Al-Amily*	28
<i>Beletra Almanako 3</i>	27
<i>Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto</i> , G. Sutton	22
<i>Esperanto via de directe methode</i> , Stano Marček	21
<i>Plena ilustrita vortaro de Esperanto 2005</i>	21
<i>Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj*</i>	20
<i>Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA*</i>	19
<i>Initiation théorique et pratique à la langue internationale Esperanto</i> , P. Denoel	19
<i>Naturaj vortordoj en Esperanto</i> , Wim Jansen*	18
<i>Vivo de Zamenhof</i> , Edmond Privat*	17
<i>Rusoj loĝas en Rusujo</i> , Red. Anna Löwenstein	16
<i>La Edda</i> , S. Sturluson/B. Ragnarsson	16
<i>Pri vagabondoj kaj friponoj, pri damoj kaj kavaliroj</i> , L. Couperus/G. Berveling*	16
<i>Vikipedio por vi</i> , Ziko van Dijk	16
<i>La Alkemiisto</i> , P. Coelho/C. Valle	16
<i>Tuj apude</i> , Humphrey Tonkin*	16
<i>Beletra Almanako 1</i>	16

Ricevitaj gazetoj

Aŭstria Fervojisto. 2009/1; Esperanta Finnlando. 2009/1; Esperanto aktuell. 2009/1; Esperanto en Azio. 2009/62; Esperanto. 2009/2; Generala Informilo. 2009/153; Heroldo de Esperanto. 2009/2; Informa Bulteno. 2009/1; Kataluna Esperantisto. 2008/348; Kontakto. 2008/4-5; La Gazeto. 2009/141; La KancerKliniko. 2009/129; La Movado. 2009/696; La Ondo de Esperanto. 2009/3; La SAGO. 2009/52; Literatura Foiro. 2009/237; Monato. 2009/2; Norvega Esperantisto. 2009/1; Pola Esperantisto. 2008/6; REGo. 2009/1; Scienco kaj Kulturo. 2009/1; Spegulo. 2009/1; Svisa Esperanto-Societo Informas. 2009/1; Usona Esperantisto. 2009/1.

Por ke Eŭropo kompreniĝu

Pli ol du semajnojn antaŭ la limdato (la 31a de marto) la germana sekcio de Eŭropo — *Demokratio — Esperanto* (EDE) sukcesis venki la ĉefan obstaklon por partopreni en la Eŭropaj Balotoj 2009. Ĝi kolektis 4.000 subtenajn subskribojn, ĉiuj kun la necesa konfirmo de la respektiva urba administrarejo pri tio, ke la subskribinto havas voĉdonrajton en Germanio. Ĉar multaj formularoj ankoraŭ ne estas traktitaj, la suma nombro de subskribintoj estas multe pli alta.

Plej verŝajne (se la balotestro ne trovos erarojn ĉe iuj formalajoj) EDE-Germanio do sukcesos partopreni en la balotoj. Tio signifas, ke 62 milionoj da germanoj povos voĉdoni por EDE la 7an de junio; la nomo *Eŭropo - Demokratio - Esperanto* troviĝos sur ĉiu balotilo. Ĉar nur ĉ. 40% de la rajtigitoj efektive iros al la balotoj, EDE-Germanio bezonos ĉ. 1,2 milionojn da voĉoj por superi la 5%-an limon por ekhavi deputitojn en la parlamento. Dum tiu ŝanco eble ne aspektos alta, alia limo — la 0,5%-a limo por ricevi altan financan subtenon de la germana ŝtato — povus esti atingebla, se oni konsideras la entuziasmon, kun kiu germanaj esperantistoj kolektis la subskribojn, kaj la ofte surprize pozitivan sintenon de neesperantistoj pri EDE.

La partopreno en la balotoj certigos al EDE grandan eĥon en amaskomunikiloj kaj la eblecon senpage elsendi varban filmeton en la germana televido. Ankaŭ en Francio la partopreno en la balotoj plej verŝajne sukcesos.

Intertempe EDE-Germanio jam povas komenci prepari sian elektokampanjon. Ĝia ĉefa slogano estas: "EDE — damit Europa sich versteht" (EDE — por ke Eŭropo kompreniĝu).

Ulrich Matthias



Sendependa internacia revuo en Esperanto kun legantoj en 65 landoj!

■ Politiko ■ Komputado ■ Scienco
■ Moderna vivo ■ Hobio ■ Sporto


www.monato.net

Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen
monato@fel.esperanto.be

Por la februara *Krucenigmo* venis 18 respondoj, krom kvar, ĉiuj ĝustaj. Ilin sendis: Jackie Huberdeau, Anne Jausions (Francio), Hans-Burkhard Dietterle (Germanio), E-klubo en Olsztyn, Jadwiga Benicka, Dorota Burchardt, Janina Dęga, Hanna Skalska, Zbigniew Tyłkowski (Pollando), Jurij Kiva-jev, Oleg Vasiljev (Ruslando), Mihailo Nešić, Siniša Veličković (Serbio), Ludmila Orajevskaja (Ukrainio). La loto donis libropremion al **Mihailo Nešić**. Ni gratulas lin!

La ĝustaj respondoj: *Horizontale:* 1. Klapo; 4. Mosto; 8. Abio; 10. Erar'; 12. Stratosfero; 13. Aso; 15. Ido; 17. Boro; 18. Posteno; 19. Gnom'; 22. Silko; 23. Monto; 25. Plonĝ'; 26. Ĉampano; 27. Panaceo; 31. Ruben'; 32. Opero; 33. Driad'; 34. Liro; 36. Negrino; 39. Anim'; 41. Omo; 44. Obo; 45. Kilimanĝaro; 47. Tria; 48. Anas'; 49. Aromo; 50. Tremi. *Vertikale:* 1. Kis'; 2. Loto; 4. Plaĝo; 5. Orfin'; 6. Tero; 7. Oro; 8. Anso; 9. Lontana; 11. Rado; 13. Abism'; 14. Orel-tamburo; 15. Indoneziano; 16. Omaĝo; 20. Komponi; 21. Aplaudi; 23. Manio; 24. Omaro; 28. Uralo; 29. Februar'; 30. Adamo; 35. Imit'; 37. Enigm'; 38. Neĝer'; 40. Ibis'; 42. Tiar'; 43. Tram'; 45. Kia; 46. Oni.

Krucvortenigmo



Horizontale: 7. Piulo vivanta en soleco; 8. Kaj Atlantiko kaj Pacifiko estas tio; 14. Latinamerika danco; 16. Antikva greka monero; 18. Mallonga sceno, kutime komika aŭ satira, prezentata de unu aŭ pluraj aktoroj kaj kompleta en si mem; 20. Renkontiĝo dediĉita al arto ofte perioda kaj internacia; 25. Granda birdo vivanta sur sekaj herbejoj; 28. Senorda konfuzo; 30. Aktiviga kialo (R); 31. Velocipedo (R); 33. Tropika frukto.

Vertikale: 2. Reakcio de vivaj organoj, precipe nervoj, je ekscito ekstera; 3. Astro; 5. Animalo - "teksisto"; 6. Sopiro, maltrankvilo; 11. Alkohola trinkajo uzata kiel apetitvekililo; 18. Serio de universitataj prelegoj; 19. Ŝtato sur Arabia duoninsulo; 21. Detruo de grundo rezulte de vento kaj pluvo; 24. La lingvo parolata de la antikvaj romanoj; 29. Restadejo de la helenaj gedioj (R); 30. Ĉiu el la 12 partoj de jaro (R).

Laŭ arkoj: 1. Insula ŝtato en Mediteraneo; 4. Manĝebla mara molusko; 9. Insulo formita de koraloj; 10. Artifiko uzata en filmado (R); 12. La dua matenmanĝo (R); 13. Loko kie akvo eliras el la tero; 15. Feliĉo venas ..., malfeliĉo venas flue; 17. Kemia elemento Br (R); 21. Scienco pri la moralo; 22. Sankta birdo de la antikvaj egiptoj (R); 23. La persona indiko de la homo, donita ĉe naskiĝo; 24. Loĝanto de apudbalta ŝtato; 26. Kiel akirite, ... perditte; 27. Sabla monteto; 32. Lumigilo; 33. = Diverskolora.

Indiko (R) signifas ke necesas enskribi nur la radikon. La solvoj devas atingi la redakcion antaŭ la 15a de junio 2009.

Kompilis Viktor Alikin

Spritaĵ splitoj kaj preskeraroj

el la kolekto de reduktoro

Elektita celpubliko

Lernolibro por parolantoj de indaj lingvoj (*Katalogo de la Esperanto-kolektaĵo de Károly Fajsz, parto II*, Budapest, 2005, p. XIX; rimarkis Ionel Oneț)

Surpisita celpubliko

Nun vi provas premi min, ĝisostan esperantiston, kiu komencis instrui Esperanton en Samarkando tiam, kiam vi ankoraŭ... scipovis nur priurini la vindoturkojn. (Eŭgeno S. Perevertajlo, <http://groups.yahoo.com/group/uea-membroj/message/12120>, 14 nov 2008)

Sur(...)-ita celpubliko, aŭ: Altruisma eltruismo

... ĉe H[ungara] E[speranto]-A[socio] iam aperis la ideo, puglikigi liston de instruantoj akceptindaj [...] kun morala subteno [...]. (Blazio Vaha, <http://groups.yahoo.com/group/esp-en-hung/message/15822>, 17 feb 2008)

Konkordaj korkordoj

Kaj tamen svingas la kordojn de la vira koro verdaj lumeroj de espero. (Norbert Barthelmess. *Ne plu ludo*, SAT, 1973, p. 63)

Longdistance kaj anhele

LINGVO-Studio, Budapest... Novajn kurojn ni planas lanĉi en mezo/fino de septembro 2008. (<http://www.eszperanto-tanfolyam.hu>, stato 27 sep 2008)

Kie ŝi anas?, aŭ: plaŭdon al LKK-estrino!

...mi substreku ke [...] Anas Bakker-ten Hagen (prez. de la LKK) (...) NE estis engaĝita en la afero. (Josef Ŝemer: *Ne troigu, homoj!* <http://www.liberafolio.org/2008/aresto2/#1218193244> 8 aŭg 2008)

Ĉu servo per amikeco?

Ĉiuj rejtaj rezervitaj (Kolofono de *Poemoj de Du Fu*, Esperanto-Asocio de Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio, 2006)

Plukis István Ertl

Juda humuro

Post du jaroj

Du samurbaj judoj elmigris Israelon. Post du jaroj ili renkontiĝas surstrate.

Meirson: Nu, ĉu vi bone vin aranĝis?

Davidzon: Ne, mi ankoraŭ laboras.

Komisio

Ĉe mortolito de tre malsana infano kunvenis liaj samfamilianoj kaj kelkaj najbaroj.

Patrino: Avrejml, kiam vi estos ĉe Dio, petu lin, ke via fratino trovu bonan kaj riĉan edzon, ke via patro ĉiam havu prosperon kaj ke viaj tri fratoj trovu bonan laboron.

Najbarino: Sara, se oni havas tiom da aferoj por diri al Dio, oni ne sendas la infanon sed oni mem iras!

Estas agrable rememori...

Berl: Ĉu vi forgesis pri la mil rubloj kiujn mi pruntedonis al vi?

Ŝmerl: Tute ne! Tio apartenas al miaj plej agrablaj memoroj.

El la kolekto de Josi Shemer

La Sukcena Lando



Sukcena Lando estas kutima nomo por Kaliningrada regiono — la plej okcidenta ruslanda regiono. Turistojn logas ĉi tien la riĉa historio, milda klimato, maro kun banurboj, unika naturparko en la Kurŝa Terlango, kaj la “suna” ŝtono. Konatiĝi kun la regiono vi povos dum la postkongresa ekskurso 1-5 aŭg 2009.

Tutaga ekskurso gvidos nin al la **Kurŝa terlango**. Ĝi estas sabla lando, etendiĝanta inter la Balta Maro kaj Kurŝa Golfo. La terlango etendiĝas je 98 km norden kie, apud Klaipėda, la trinkebla akvo de la golfo venas al la maro. Vi ekscios pri formiĝo de la terlango, pri apero de plantoj, pri loĝatigo far prusoj kaj kurŝoj, pri la vivo en fiŝkaptistaj vilaĝoj, pri konstruado de kasteloj kaj pri batalo kontraŭ sablo.

La sablaj dunoj etendiĝas laŭ la bordoj kaj logas per sia majesteco. En mallarĝaj lokoj pinoj, kliniĝintaj pro ventoj, estas nomataj “dancantaj” (vidu la suban foton).

Sukceno estas la ĉefa naturdotajo de la regiono. Ekde la antikva tempo sukceso danke al facileco en prilaboro, multeco de koloroj kaj ties nuancoj iĝis valora materialo por produkti unikajn artaĵojn. Multaj legendoj kreiĝis pri sukceso, oni atribuis al ĝi diecajn kaj magiajn kvalitojn.

La plej granda rezervejo de sukceso kaj centro de ĝia prilaborado troviĝas en la urbeto **Jantarnyj** (antaŭe Palmnicken). Iam ĉi tie komenciĝis la Granda Sukcena Vojo. La multjarcenta agado de homoj pri eliminado de sukceso eĉ kontribuis al formado de bela marbordo kun vastaj sablaj plaĝoj. Sur la loko de la iamaj minejoj formiĝis artefaritaj lagoj kun mara aŭ trinkebla akvo, dank’ al sukceso posedanta kuracajn ecojn. Vi vizitos la vidplaceton, kiu montras panoramon al la minejo. Oni povas fotiĝi en la mezepokaj vestaĵoj. Ekzistas eĉ pendumilo kun la gotika averto: “Ĉi tie estos pendumita ĉiu, kiu ŝtelis sukconon de la ordeno. Hermann von Salca”. En la muzeo ni ne nur pririgardos fajnajn artaĵojn, sed propramane faros memoraĵojn el sukceso. La ricevitajn kvalifikaĵojn pruvos diplomo de submajstro.

Plia ekskursocelo gvidos al **Svetlogorsk** (antaŭe Rauschen) — kurac- kaj ban-urbo ĉe la maro, kiun oni konsideras la plej ĉarma urbo en la regiono. Apudmara promenejo, arbaro, lago, trankvila etoso, sablaj plaĝoj kaj apudbordaj krutaĵoj — ĉio ĉi servas por agrabla ripozo de la korpo kaj de la spirito.

Halina Gorecka



Foto de Olga Šipovalenko



Germanio. 23 feb, je la Rozolundo, en la urboparto Pöhlde de la Esperanto-urbo Herzberg am Harz estis inaŭguritaj novaj lignaj bonvenigaj tabuloj en la germana kaj en Esperanto. Sur la foto kun esperantistoj estas la prezidanto de la karnavala klubo Ulli Müller kaj la principaro de la karnavalo. (GEC/ICH)



Kroatio. 22 feb en karnavala parado en Rijeka partoprenis pli ol ok mil maskitoj, kiujn spektis ĉ. 120 mil personoj. Esperanto-Societo Rijeka havis sian 40-personan grupon *Esperanto-Maskerada Kompanio “Paždroć”* = tohuvoĥuo en la kroata ĉakava dialekto. (Vjekoslav Morankić / Branko Popović)



Pollando. La tuta esperantistaro nun senpacience atendas la 94an Universalan Kongreson en Bjalistoko, en kiu oni inaŭguros la Esperanto-Centron Zamenhof. Sed en la koridoro de la nova bjalistoka lernejo №51 *Ludoviko Zamenhof* oni jam povas vidi la fasadon de la Centro. (Nina Pietuchowska)




Jorge Luis Borges. *La sekreta miraklo*
 Serio Mondliteraturo, Volumo 16
 200 paĝoj, 18 eŭroj



Jules Verne. *Ĉirkaŭ la mondo dum okdek tagoj*
 Serio Mondliteraturo, Volumo 15
 208 paĝoj, 20 eŭroj



J.R.R. Tolkien. *La hobito, aŭ tien kaj reen*
 Serio Mondliteraturo, Volumo 9
 224 paĝoj, 18 eŭroj



Georges Simenon. *La flava hundo.*
 Serio Mondliteraturo, Volumo 14
 120 paĝoj, 12 eŭroj.